


Aperis la 3-a MONA Bulteno.

Por elŭti ĝin kaj la antaŭajn numerojn aŭ por legi la Istan numeron rete bonvolu iri al la menuero "MONA Bulteno". Jen ligilo por la menuero:

<https://monainformado.wordpress.com/2017/07/06/mona-bulteno/>

Ne forgesu ke vi povas aboni al nia retejo libere lasante vian retpoŝtadreson. Por tio bonvolu iru al la dekstra flanko de la retpaĝo.

<https://monainformado.wordpress.com/>



<https://monainformado.wordpress.com/>

Imponaj Landa Kunveno kaj kursfino en Tel-Avivo

שלום חברים,

כ- 60 איש השתתפו במפגש הארצי שנערך אתמול בתל אביב. כבר שנים לא זכינו למספר כזה מה גם שרבים מן המשתתפים היו חדשים. כעשרים הגיעו מן הקורס שהיה הצלחה גדולה: מתוך כ-30 שנרשמו סיימו 22, ואם לשפוט לפי ההתלהבות והרמה הלשונית, רבים מהם יהפכו לחברים פעילים. בסוף המפגש נערכה העניקה חגיגית של תעודות למסיימים, וכל אחד גם קיבל מתנה. כמה מהם אף השתתפו בתוכנית הערב או סיפרו סיפורים אישיים. אחת למשל סיפרה הסבתא רבה שלה הייתה אחותה של קלרה, אישתו של זמנהוף. כולם הודו למורה הנדיב דורון ולעוזרים, ובעיקר לאמיר, שתיאם, סייע וליווה את הקורס משלב הפירסום.

המפגש הארצי התקיים באולם הגדול של ויצ"ו, ליד חדר המועדון, שקושט ע"י לאה ויואלה, שגם דאגו לכיבוד. במשך יותר משעה לפני ההתחלה, חברים נפגשו, פטפטו וקנו ספרי אספרנטו, חולצות ועוד מתוך ההיצע המגוון שניהלה אנריקה התוכנית, שנערכה כרגיל ע"י מטילדה, היתה עשירה ומגוונת: פתחו מיכאל ואנריקה, בשירים וביניהם אחד של ג'ומרט ונטשה, אורחינו בסופשבוע בעכו. בהמשך שרה אנריקה, וערן סיפר עם שקפים על ספר אספרנטו מתחילת המאה שעברה. ישראלה, מבוגרות הקורס (ואמא של ינאי, התלמיד הצעיר בקורס) הקסימה את הנוכחים בשיר באספרנטו עם ליווי הפסנתר של דורון. לאחר מכן, שלמה, הגזבר, הציג את הדו"ח הכספי לשנת

2017. עודד יחד עם בוגר הקורס רועי, שרו תרגום אספרנטו לשיר "רואים רחוק רואים שקוף". והושע סיפר על הדירה של אלי שאנחנו מנסים להשכיר כעת, וזקוקים למי שיראה אותה לשוכרים פוטנציאליים. ההפסקה לה הקציבה מטילדה עשר דקות התארכה לכמעט חצי שעה, בשל השיחות הערות בין החברים ומסיימי הקורס והפעילות בשולחן הכיבוד וברכישות הספרים.

אחרי ההפסקה ניגן דורון קטע של שופן, ושני בוגרי הקורס, רועי וינאי, קראו באספרנטו מושלמת טקסט ארוך שהם עצמם כתבו על איך הם למדו את השפה. טלי רקדה ריקודים אירותמיים, שגם תציג בקונגרס העולמי בליסבון, ודוד דיקלם טקסט חדש שחיבר לאחרונה. לאה קראה מצגת ארוכה על זמנהוף, שאותה תרגמה מהווידיאו הפולני של רדיו פולין ולבסוף, מורה הקורס דורון ואני מטעם אל"י הענקנו את התעודות לבוגרי הקורס. זמן רב לאחר שנדמו צילי ההמנון, נותרו עוד הרבה חברים ותיקים וחדשים לדבר ולתכנן המשך פעילות כמו במפגש סוף הקיץ המסורתי בסוף אוגוסט, ומי שישתתף בקונגרס העולמי – בסוף יולי בליסבון.

מצורפות כמה תמונות ורבות נוספות ב <https://www.facebook.com/amri.wandel>.
בברכת קיץ נעים,
עמרי

Karaj geamikoj,

Ch. 60 personoj partoprenis hierau la someran Landan Kunvenon en Tel Avivo. Jam de pluraj jaroj ni ne spertis tioman nombron, despli ke multaj el la partoprenintoj estis novaj. Ch. dudek venis de la granda E-kuroso, kiu estis senprecedence sukcesa: el ch. 30 alighintoj finis 22, kaj se jughi lau ilia entuziasmo kaj lingva nivelo, multaj farighos aktivaj membroj.

Fine de la kunveno okzis solena disdonado de la atestoj, chiu el la finintoj ricevis atesoton kaj donaceton. Pluraj el ili partoprenis en la vespera programo au rakontis personajn rakontojn: ekzemple unu rakontis ke shi estas la pranepino de la fratino de Klara, la edzino de Zamenhof. Chiu entuziasme dankis al la sindona instruisto d-ro Doron Modan, kaj al la helpantoj, aparte al Amir Naor, kiu kunordigis, helpis akompanis la kurson ekde la reklama fazo.

La kunveno okazis en la granda salono de WIZO, apud nia klubejo, kiu estis bele ornamita far Lea kaj Joela, kiuj ankau prizorgis la regalon. Dum pli ol unu horo antau la komencigo, la partoprenantoj vigle renkontighis, interparolis kaj achetis E-librojn, T-chemizojn kaj objektojn el richa oferto mastrumita de Enrica.

La programo, kunmetita kiel chiam de Matilda, estis richa kaj varia: la kunvenon malferims kantoj de Mikaelo kaj Enrica, unu el ili "Folioj de mia memoro" de Jomart jah Natasha, kiuj koncertis antau du monatoj en la Israela Kongreso. Sekvis kantoj de

Enrica, prelego de Eran pri malnova E-libro. Israela, kursfinantino (kaj patrino de la plej juna kursano) belege kantis esperante kun piana akompano de Doron. Poste Shlomo, la kasisto, prezentis la financan raportode 2017. Oded kun alia kursano, Roi, kantis E-tradukon de konata Hebrea kanto, kaj Jehoshua rakontis pri la apartamento de ELI, kiun ni provas nun luigi. Sekvis pauzo kiu plilongighis de dek minutoj al preskau duonhoro, pro la viglaj interparoladoj kaj libro-achetoj.

Post la pauzo Doron ludis pecon de Chopin, kaj du kursanoj, Roi kaj Janai, legis en perfekta Esperanro longan tekston kiun ili mem verkis, pri kiel ili lernis la lingvon. Tali dancis eurtimajn dancojn, kiuj shi prezentos ankau en Lisbono, kaj David deklamis tekston kiun li nove verkis. Lea faris longan prezentajhon pri Zamenhof, kiun shi tradukis el la pola de video de Pola Radio, kaj fine la kursinstruisto Doron kaj mi nome de ELI donis la atestojn al la kursfinintoj.

Longe post kiam chesis la sonoj de la himno, multaj veteranaj s-anoj kaj novuloj ankoraŭ restis por interparoli kaj plani estontan aktivecon, kiel la tradicia SOmerFIna renkontigo fine de agosto, kaj por tiuj kiu iros al la UK – en Lisbono.

Aldone estas kelkaj fotoj, kaj multaj pli videblas en <https://www.facebook.com/amri.wandel>

Amike,
Amri Wandel
Prezidanto de ELI



Rakontoj de 1,001 noktoj Enkonduko al Arabaj noktoj

(15/7/2018)

Inter la rakontoj de antaŭaj popoloj estas rakonto pri tio, ke en antaŭaj tempoj en la insuloj de Hindujo kaj Ĉinujo estis sasana (1) reĝo, mastro de armeoj, gardistoj, servistoj kaj dungitoj, kiu havis du filojn unu pli aĝan kaj unu pli junan. Kvankam ambaŭ estis lertegaj rajdantoj la plej aĝa estis pli lerta ol sia frato.

Li regis la landojn kaj traktis siajn subulojn juste kaj ĝuis la bonan volon de ili ĉiuj. Lia nomo estis Reĝo (2) Ŝahrijar, dum lia juna frato, kiu regis la persan Samarkandon, estis nomata Reĝo Zaman. Dum 10 jaroj ili ambaŭ regadis juste kaj ĝuis plaĉan kaj senproblemajn vivojn, ĝis kiam Reĝo Ŝarijar sentis deziron vidi Reĝon Zaman kaj sendis sian veziron (3) por venigi lin. "Aŭdo estas oboe" diris la ministro kaj,

save vojaĝinte al Reĝo Zaman, li portis al li la salutojn kaj diris al li, ke lia frato atendis viziton de li.

La reĝo Zaman konsentis iri kaj ekfaris siajn preparojn por la vojaĝo. Li igis munti siajn tendojn ekster sia urbo kune kun siaj kameloj, muloj, servistoj kaj gardistoj, dum lia propra veziro estis lasita kiel reganto de la landoj. Poste li mem eliris el la urbo por iri al la lando de sia frato, sed je noktomezo li pensis pri io, kion li forgesis, kaj li reiris al la palaco. Kiam li eniris sian ĉambron, li malkovris sian edzinon en la lito kun nigra sklavo. La mondo iĝis nigra por li, kaj li diris al si mem: "Se ĉi tio estas tio, kio okazas eĉ antaŭ ol mi forlasis la urbon, kion ĉi tiu damninda virino faros, se mi pasigos tempon fore ĉe mia frato?" Kaj tiel li eltiris sian glavon kaj frapis ilin, mortigante ambaŭ sian edzinon kaj ŝian amanton, kiuj kuŝis kune, antaŭ ol reiri kaj ordoni al siaj akompanantoj ekiri.

Kiam li alproksimiĝis al la urbo de Reĝo Ŝahrijar, li antaŭsendis mesaĝistojn por doni la bonan novaĵon pri lia alveno kaj Ŝahrijar elvenis por renkonti lin kaj salutis lin tre ĝue. La urbo estis ornamita per dekoracioj kaj Ŝahrijar sidadis feliĉe parolante kun li, sed la Reĝo Zaman memoris tion, kion la edzino faris kaj, venkita de malĝojo, iĝis pala kaj donis signojn de malsano. Lia frato pensis, ke tio ŝuldiĝas al la fakto, ke li devis lasi sian regnon, kaj li ne faris demandojn al li ĝis post kelkaj tagoj, kiam li menciis tiujn simptomojn al Reĝo Zaman, kiu diris: "Miaj sentoj estas vunditaj." sed li ne klarigis tion, kio okazis pri lia edzino. Por refeliĉigi lin Ŝahrijar invitis lin akompani lin dum ĉasado., sed li rifuzis kaj Ŝahrijar ekiris sole.

En la reĝa palaco estis fenestroj, kiuj supergardis al la ĝardenoj de Ŝahrijar, kaj dum la reĝo Zaman estis rigardanta malfermiĝis pordo kaj jen eliris dudek sklavinoj kaj dudek sklavoj kaj en la mezo de ili estis la tre bela edzino de Ŝahrijar. Ili paŝis al iu fontano, kie ili deprenis siajn vestojn kaj la virinoj sidis kun la viroj. "Mashud" la reĝino vokis, je kio nigra sklavo venis al ŝi. Kaj ĉirkaŭbrakuminte unu la alian, ili kuŝis kune, dum la sklavoj kuŝis kun la sklavinoj kaj ili pasigis sian tempon per kisado, ĉirkaŭbrakado, fikado kaj trinkado de vino ĝis la fino de la tago.

Kiam la reĝo Zaman vidis tion, li diris al si mem, ke tio, kion li suferis, estis malpli grava. Lia angoro pro ĵaluzo finiĝis, kaj, konvinkinte sin, ke lia propra malbonŝanco estas pli malgrava ol ĉi tiu, li plu manĝis kaj trinkis, tiel ke, kiam Ŝahrijar revenis kaj la du fratinoj intersalutis, Ŝahrijar vidis ke la koloroj de la reĝo Zaman revenis,

ke lia vizaĝo estas rozkolora kaj ke post la antaŭa perdo de apetito li manĝas normale. "Vi estis pala, frato" diris Shahrijar, "sed nun vi rehavis viajn kolorojn. Do, rakontu al mi pri tio." Mi rakontos al vi, kial mi perdis mian koloron" la frato respondis "sed ne premu min rakonti, kial mi rehavis ĝin." "Diru al mi unue kiel vi perdis vian koloron kaj kiel vi fariĝis tiel malforta." Shahrijar demandis, kaj lia frato klarigis. Kiam vi sendis vian viziron por inviti min viziti vin, mi pretiĝis kaj jam iris ekster la urbon, kiam mi memoris pri juvelo, kiun mi intencis donaci al vi, kaj kiun mi estis forgesinta en la palaco. Mi reiris tien kaj trovis nigran sklavon, kiu dormis en mia lito kun mia edzino. Mortiginte ilin ambaŭ, mi ekvenis al vi. Mi estis plene koncernita pri tiu afero, kaj pro tio mi iĝis pala kaj malsaneca, sed ne petu min diri, kiel mi resaniĝis. Ŝahrijar, tamen, premis lin fari tion, kaj en la fino Ŝah Zaman rakontis al li ĉion, kion li estis vidinta.

"Mi volas vidi tion per miaj okuloj" diris Ŝahrijar. Tiam Ŝah Zaman sugestis, ke li ŝajnigu, ke li volas iri ĉasi ree, kaj ke poste li kaŝu sin kun li por testi la veron per siaj propraj okuloj.' Ŝahrijar tuj anoncis, ke li foriras por ĉasado. La tendoj estis metataj ekster la urbon kaj la reĝo mem foriris kaj ekprenis sian sidejon en unu el ili. Li diris al siaj servistoj, ke neniu devas esti enlasita por viziti lin. Poste sekrete li reiris malantaŭen al la palaco, kie lia frato estis kaj li sidiĝis ĉe la fenestro, kiu permesis rigardi la ĝardenon. Post iom da tempo la sklavinoj kaj ilia mastrino alvenis tien kun la sklavoj kaj ili ade faris tion, kion Ŝah Zaman estis priskribinta ĝis la voko por la posttagmeza preĝo.

Ŝahrijar estis ekster si mem pro kolero kaj diris al sia frato: "Venu, ni foriru tuj. Ĝis ni trovos iun alian, al kiu la same tiaj aferoj okazas, ni ne bezonas regnon, kaj aliflanke ni prefere estus mortaj." Ili foriris tra la malantaŭa pordego kaj iradis dum kelkaj tagoj kaj noktoj ĝis ili alvenis al alta arbo en la mezo de herbejo, kie estis akvo-fonto ĉe la marbordo. Ili trinkis ĉe la fonto kaj eksidis por ripoziĝi, sed post iom da tempo la maro iĝis maltrankvila kaj el ĝi elkreskis nigra kolono, alta ĝis la ĉielo kaj moviĝanta al la herbejo. Ĉi tiu vido alarmis la fratinojn, kaj ili grimpis al la pinto de la arbo por vidi tion, kio okazos. Tio, kio poste aperis estis alta feo (4) kun ronda kapo kaj larga brusto. Li portis keston sur sia kapo. Li venis al la marbordo kaj pluiris por eksidi sub la arbo, sur kies pinto la du fratinoj estis kaŝitaj. La feo poste malfermis la keston kaj elprenis skatolon. Kiam li estis malferminta ankaŭ la skatolon, el ĝi elvenis maldika knabino, disradiana kiel la suno, kiu precize kongruis kun la tre bona

priskribo, donita de la poemisto Atija (5)

*Ŝi briladis en la nokto, kaj aperis dume tago,
Kaj la arboj ŝutis brilon, jen ilia bona ago.
Ŝia brilo puŝis sunon al ekbrilo kaj leviĝo,
Kaj la lumo de la luno ĝemas nun pro humiliĝo
Se vualoj poste falas, jen aperas la vizaĝo.
Ĉio apud ŝi kliniĝas en respekto kaj omaĝo.
Se la fulmo eke flugas ek de ŝia restoloko
Tiam larmopluvo falas, venas la inunda ŝoko.*

La ĝino rigardis al ŝi kaj diris: "Sinjorino de nobla naskiĝo, kiun mi forkaptis en la nokto de via geedziĝo, mi volas dormi iomete" Li metis sian kapon sur ŝiajn genuojn kaj endormiĝis, dum ŝi, siaflanke, rigardis la arbon, sur kies supro estis la du reĝoj. Ŝi levis la kapon de la ĝino el siaj genuoj kaj metis ĝin sur la teron, antaŭ ol ŝi gestis al ili malsupreniri kaj ne timi lin. "Je Dio, ne demandu al ni fari tion," ili diris al ŝi, sed ŝi respondis: "Se vi ne venos, mi vekos lin kontraŭ vi kaj li submetigos vin al la plej kruela de la mortoj. Ĉi tio, tiom alarmis ilin, ke ili faris tion, kion ili estis diritaj kaj tiam ŝi diris: "Amoru kun mi kiel eble plej forte aŭ alie mi vekos lin." Ŝahrijar diris timeme al sia frato: "Faru tiel, kiel ŝi diras." Sed Ŝah Zaman rifuzis, dirante: "Vi faru ĝin unue."

Ili komencis gesti unu al la alia pri tio kaj la knabino demandis kial, ripetante: "Se vi ne venos kaj agos, mi vekos la feon kontraŭ vi." Ĉar ili timis, ili alterne kuŝis kun ŝi kaj tiam, kiam ili finis, ŝi diris al ili leviĝi. El ŝia poŝo ŝi tiam elprenis monujon el kiu ŝi elprenis ŝnuron sur kiu pendis kvincent sepdek ringoj. Ŝi demandis ilin, ĉu ili scias, kio ili estas kaj ĉar ili respondis "ne", tiam ŝi rakontis al ili: "Ĉiuj ĉi apartenis al amatoroj de mi kiuj kokris al ĉi tiu feo, tial donu al mi vian propran ringon. Kiam ili transdonis siajn ringojn, ŝi daŭrigis: "Ĉi tiu feo forkaptis min de mia geedziĝa nokto kaj metis min ene de skatolo, kiun li metis ene de ĉi tiu kesto, kun la sep pezaj seruroj, kaj tiam, ĝin metis ĉe la fundo de la tumulta maro kun la koliziantaj ondoj. Tion, kion li ne sciis estis, ke kiam virino volas ion, nenio povas malhelpi ŝin, kiel la poeto diris:

*Vi ne fidu je virinojn, je la ina tuta gento,
Nek vi kredu tute firme je donita la konsento.
Ĉe virinoj nur dependas kaj la ĝojo kaj doloro
De kaŝitaj korpopartoj ne nomeblaj pro pudoro.
Ili daŭre ĉie, ĉiam montras kaj aŝiŝas amon,
Sed perfido de la vestoj estas ĉefa la ornamo.
Nun relegu pri Jozefo, pri la longa viv-rakonto.
Tie estas inaj trukoj kaj da ili tuta fonto.*

*Vi memoras pri Edeno kaj forpelo de Adamo?
Ĉu ne ina la intrigo, estis kaŭzo de la dramo?*

Alia poeto diris

*Sed nur al kulpinto devas iri rekte la riproĉo
Sed mi kreskis, iĝis viro, ne mia ofendovoĉo.
Mi amanto estas vere, tamen miaj am-kiomoj
Estas samaj kiel tiuj de antaŭaj ĉiuj homoj.
Sed mirindas viro, kiu restis sen la peza jugo,
Ĉar virinoj neniam min kaptis per alloga pugo.*

Kiam la du reĝoj aŭdis tion, ili pleniĝis je mirego kaj diris unu al alia: "Kvankam feo li estas, tio,, kio okazis al li estas pli malbona ol tio, kio okazis al ni, kaj ĝi estas io, kion neniu alia spertis." Ili forlasis la knabinon tuj kaj reiris al la urbo de Ŝahrijar, kaj kiam ili eniris la palacon ili dehakis la kapojn de la reĝino, kaj la sklavinoj kaj la sklavoj.

Ĉiunokte dum la venontaj tri jaroj, Ŝahrijar prenis virgulinon al sia lito, malvirigis ŝin kaj poste mortigis ŝin. Tio kondukis al maltrankviliĝo inter la civitanoj, ili forfuĝis kun siaj filinoj ĝis ne estis iu knabino taŭga por edziniĝo. Tiam, kiam la veziro estis ordonita alporti knabinon al la reĝo kiel kutime, li serĉis sed ne sukcesis trovi eĉ unu, kaj devis iri hejmen kun malplenaj manoj deprimita kaj timis tion, kion la reĝo povus fari al li.

Tiu viro, la veziro, havis du filinojn, el kiuj la pli aĝa estis nomita Ŝahrazad kaj la pli juna Dunjazad. Ŝahrazad legis librojn kaj historion, raportojn de pasintaj reĝoj kaj rakontojn de fruaj homoj, kaj kolektis, oni diris, mil volumojn de tiuj, kiuj enhavis informojn pri popoloj, reĝoj kaj poetoj. Ŝi demandis sian patron, kio kaŭzis lin fariĝi tiel zorgoplena kaj malĝoja, citante la liniojn de poeto:

*Diru al persono, kiu estas tute zorgoplena,
ke ne daŭras ĝojoj, zorgoj. Pasantoj ankaŭ zorgo ĝena.*

Kiam ŝia patro aŭdis tion, li diris al ŝi ĉion, kio okazis inter li kaj la reĝo de komenco al fino, jekiu ŝi diris: "Patro, edzinigu min al tiu viro. Mi aŭ transvivos aŭ alie mi estos elaçetaĵo por la infanoj de la islamanoj kaj savi ilin de li." "Je Dio," li ekkriis, "vi ne risku vian vivon!" Ŝi insistis ke tio devus esti farita, sed li rifuzis: "Mi timas ke vi povas sperti tion, kio okazis al la azeno kaj la bovo kun la komercisto." "Kio estis tio," ŝi demandis, "kaj kio okazis al ili?" ŜIA PATRO RAKONTIS AL ŜI:

Sciu, mia filino, ke iu komercisto, havis ambaŭ riĉecon kaj bestojn kaj estis donacita, per la Ĉiopova Dio, scipovon de bestaj kaj birdaj lingvoj. Li vivis en kamparo kaj havis en sia hejmo azenon kaj bovon. Iutage la bovo iris al la kvartalo de azeno kaj trovis la ejo balaita kaj ŝpruĉigita per akvo; estis kribrita hordeon kaj pajlo en la manĝujo, dum la azeno kuŝis tie trankvile. Foje lia mastro surrajdus lin eksteren por ia tasko, kaj poste kondukis lin reen.

Unu tagon la komercisto aŭdis la bovon diri al la azeno: "Mi gratulas vin. Jen, mi estas laca, dum vi estas en via komforto, manĝante la kribritan hordeon. Foje la mastro metas vin en sia servo, rajdante vin sed poste kondukas vin reen, dum mi ĉiam estas pluganta kaj muelanta maizon." La azeno respondis: "Kiam oni metas la jungon sur vian kolon kaj volas konduki vin eksteren al la kampoj, ne elstariĝu, eĉ se oni batos vin, aŭ alie stariĝu kaj poste rekuŝiĝu teren. Kiam oni kondukos vin reen kaj metos faboj por vi, ŝajnigu, ke vi estas malsana do ne manĝu ilin; dum unu, du aŭ tri tagoj nek manĝu nek trinku, kaj tiel vi havos ripozon de via malfacila laboro."

La sekva tago, kiam la paŝtisto alportis la manĝon al la bovo, ĝi nur manĝis iomete kaj sekvamaten, kiam la viro alvenis por konduki ĝin al plugado, li trovis ĝin malsana kaj diris malgaje: "Jen kial li ne povis labori ĝuste hieraŭ." Li iris al la komercisto kaj diris al li: "Sinjoro, la bovo estas malsana, kaj ĝi ne manĝis sian manĝaĵon hieraŭ vespere." La komercisto komprenis tion, kio okazis, kaj diris: "Iru kaj konduku la azenon fari la plugadon por la tuta tago anstataŭ ol la bovo."

Kiam la azeno venis reen vespere post kiam ĝi estis multe uzata por plugi la tutan tagon, la bovo dankis lin pro lia bonkoreco donaci al ĝi unutagan ripozon, je kio la azeno, plena je maldolĉa bedaŭro, ne respondis. La sekvan matenon, la paŝtisto venis kaj kondukis ĝin denove al plugado ĝisvespera, kaj kiam la azeno revenis, lia kolo estis forskrapita krude kaj li estis duone morta pro laceco. Kiam la bovo ekvidis lin, li dankis kaj laŭdis lin, sed la azeno diris: "Mi estis sidanta en komforto, sed mi ne atentis miajn proprajn aferojn" Tiam li daŭrigis: "Mi havas kelkajn konsilojn por doni al vi. Mi aŭdis la mastron diri ke se vi ne povas stariĝi, li donos vin al la buĉisto por buĉado, kaj via felo estos elpecigita. Mi estas maltrankvila pri vi kaj tiel mi donis al vi tiun konsilon."

Kiam la bovo aŭdis kion la azeno diris, li dankis lin kaj

diris: "Morgaŭ mi iros kun la viroj." Li tiam finis sian tutan manĝaĵon, kaj eĉ forlikis la staltrigon. Dum ĉiu ĉi okazis, la komercisto aŭskultis kion la bestoj estis dirantaj. La sekva mateno, la komercisto kun sia edzino eliris kaj iris sidi apud la bovejo kiam la paŝtisto estis alvenanta kaj kondukanta la bovon eksteren. Kiam la bovo vidis sian mastron, li ŝvingis la voston, furzis kaj galopis for, lasante la homon ridantan tiom multe, ke li falis surteren. Lia edzino demandis, kial li ridas, kaj li responds al ŝi: "Mi ridis pro io sekreta, kiun mi vidis kaj aŭdis, sed mi ne povas diri tion al vi alie mi mortos." "Eĉ se vi mortos," ŝi insistis, "vi devas diri al mi la kialon de tio." Li ripetis, ke li ne povis fari tion pro timo de morto, sed ŝi diris: "Vi mokridas al mi," kaj ŝi daŭrigis insisti obstine ĝis ŝi venkis. En sia mizero la komercisto alvokis siajn gefilojn, kaj alvokis la kadion (6) kaj la notarion kun la intenco lasi siajn finajn instrukciojn antaŭ ol sciigi sia edzinon la sekreton kaj poste morti. Li havis profundan amon por ŝi, ŝi estis lia kuzino kaj la patrino de liaj gefiloj, dum li mem estis centdudek jaraĝa.

Kiam lia tuta familio kaj liaj najbaroj kunvenis, li klarigis, ke li havis ion por diri al ili, sed kiam li rakontos tiun sekreton al iu ajn, li mortos. Ĉiuj instigis lian edzinon ne premi lin kaj tiel provoki la morton de la edzo kaj de la patro de la gefiloj. Sed ŝi diris: "Mi ne haltos ĝis li diros al mi, kaj mi lasos lin morti." Je tio, la aliaj silentis dum la komercisto stariĝis kaj iris en la bovejo por fari la ceremonion de purigado (7), post kio li revenos al ili por rakonti kaj morti.

La komercisto havis kokon kaj kvindek kokinojn, kune kun hundo, kaj li aŭdis la hundon maltrankviligi la kokon dirante: "Vi povas esti gaja, sed tie estas nia mastro, kiu baldaŭ mortos." Kiam la koko demandis kial tio estis, la hundo diris al li la tutan rakonton. "Je Dio," kriis la koko, "li devas esti malforta en la kapo. Mi havas kvindek edzinojn kaj mi tenas ilin kontentaj kaj en paco dum li havas nur unu sed li ankoraŭ ne povas teni ŝin en ordo. Kial li ne prenas kelkajn morusajn branĉetojn, prenas ŝin en ĉambron kaj batas ŝin ĝis ŝi aŭ mortas aŭ pentas kaj ne demandas lin denove?"

La veziro nun diris al sia filino Ŝahrazad: "Mi traktos vin kiel tiu viro traktis sian edzinon." "Kion li faris?" ŝi demandis, KAJ LI DAŬRIGIS:

Aŭdinte kion la koko diris al la hundo, li tranĉis kelkajn morusajn branĉetojn kaj kaŝis ilin en ĉambron, kie li prenis sian edzinon. "Venu," li diris, "tiel ke mi povas paroli kun vi ĉi tie kaj tiam morti tie, kie neniu

rigardas.” Ŝi eniris kun li la ĉambron kaj li ŝlosis la pordon post ŝi kaj li komencis bati ŝin, ĝis ŝi svenis. “Mi pentas pri ĉio ĉi,” ŝi tiam diris, kaj ŝi kisis liajn manojn kaj piedojn, kaj post kiam ŝi pentis, ŝi kaj ŝia edzo eliris je la ĝojo de lia familio kaj de la aliaj tie. Do, ili vivis en la plej feliĉaj cirkonstancoj ĝis siaj mortoj.

Ŝahrazad aŭskultis tion, kion ŝia patro devus diri, sed ŝi ankoraŭ insistis pri ŝia plano kaj tiel li puŝis ŝin eksteren kaj prenis ŝin al Reĝo Ŝahrijar. Ŝi estis doninta instrukciojn al sia pli juna fratino, Dunjazad, klarigante: “Kiam mi iros al la reĝo, mi alvokos vin. Vi devas veni, kaj kiam vi vidos, ke la reĝo jam faris tion, kion li volis kun mi, vi devas diri: ‘Rakontu al mi fabelon, fratino, por pasigi la sendorman parton de la nokto.’ Mi rakontos tiam al vi fabelon, kaj se Dio volas, Li savos nin.

Ŝahrazad nun estis prenita de ŝia patro al la reĝo, kiu estis kontenta revidi lin kaj diris: “Ĉu vi alportis tion, kion mi volas?” Kiam la veziro jesis, la reĝo volis kuŝi kun Ŝahrazad sed ŝi verŝis larmojn kaj kiam la reĝo demandis kio estis la problemo, ŝi rakontis al li: “mi havas pli junan fratinnon kaj mi deziras adiaŭi ŝin.” Je tio, la reĝo alvokis Dunjazad kaj kiam ŝi ĉirkaŭprenis Ŝahrazadon, ŝi prenis sidlokon apud la lito, dum la reĝo stariĝis kaj malvirigis ŝian fratinnon. Poste ili sidiĝis por paroli kaj Dunjazad petis, ke Ŝahrazad rakontu fabelon por pasi la restantan parton de la nokto. “Kun plej granda plezuro,” respondis Ŝahrazad, “se nia klera reĝo donas al mi la permeson.” La reĝo estis maltrankvila kaj kiam li aŭdis, kion la fratinoj diris unu al la alia, li ĝojis je la penso aŭskulti rakonton kaj tiel li donis sian permeson al Ŝahrazad.

(1) *Sasana, aŭ sasanida aŭ sasanana – laŭ eŭropaj lingvoj – estas vasta imperio persa ekzistinta de la jaro 224-a al la jaro 651-a de la komuna erao. Ĝi estis konata al la tiamaj homoj kiel Ērānshahr kaj Ērān en la meza persa kaj kiel Iranshahr kaj Iran en la nova persa.*

(2) *La titolo uzata tra la tuta persa regiono estas Ŝah, kiu estas tradukebla per 'reĝo' aŭ per 'imperiestro' (reĝo de reĝoj).*

(3) *Temas fakte pri “veziro”, kiu en pluraj lokoj de la islama mondo en pluraj epokoj estis helpanto de la reĝo kiel ministro aŭ ĉefministro.*

(4) *Ĉi tie oni uzas la ĝeneralan vorton “feo” por eviti la uzon de la arabdevena ‘ĝino’. Fakte en ĉiuj kulturoj ekzistis pli malpli samaj ‘koboldoj’ kaj ne valoras havi senfinan liston de nomoj por ĉiu speco de ili.*

(5) *Ĝarir Ibn Atija (Jarir ibn-Atiya): ĉefa poemisto de la umaja (Umayyad Caliphate en la angla) periodo, fama pro siaj laŭdaj kaj insultaj versoj, mortinta en 729.*

(6) *Fakte temas pri “kadio” aŭ juĝisto, kiu plenumas samtempe sociajn kaj religiajn taskojn*

(7) *‘Ceremonio de purigado’ estas korpa purigado de islamanoj antaŭ ol la preĝo.*

Prelego pri la 11-a Mezorianta Kunveno en Marakeŝo

(17/7/2018)

Prelego farita en Rusujo de Tatjana Loskutova pri la 11-a Mezorianta Kunveno en Marakeŝo. Ĝi ĉefe bilde priskribas la tutan kunvenon inkluzive de la ekskursoj.

Jen ligilo por elŝuti ĝin:

<https://mega.nz/#!oNwIEK4K!>

**1wvR7S2DSxWbG1Jw4J5cMCpnaHR4YJiAVohtgC
R8F5g**



PROLOGO

1.
Kiu kreis universon per potenca ĉiopovo,
Tiu de ĉiel' animis la estaĵojn per la blovo,
Al ni, homoj li donacis variecon de terглоbo,
Kaj devenis de li reĝoj laŭ similo kaj la volo.
2.
Ho, unika plejaltulo, aĵojn faris via mano,
Helpu min potenco via piedpremi la satanon,
Donu al mi la ĝismortan, de miĝnuroj [1] ardan flamon,
Malpezigu terajn pekojn dum la horo de kondamno.
3.
La leono de Tamari [2] dece portas ŝildon, glavon,
De reĝino sunvizaĝa, kiu havas nigrajn harojn,
Mi kuraĝas ilin glori, esprimante grandan raven,
Sentas ĉiu la dolĉecon, kiu vidas tiun paron.
4.
Ni glorkantu la reĝinon per varmegaj sangaj larmoj,
Jam pli frue mi ŝin gloris per ekstazaj ditiramboj.
Mi por skribo uzis kanon, inkon el okulaj lagoj,
Koron de la aŭskultanto pro amego piku glavo.
5.
Oni donis al mi taskon – verki belsonontajn strofojn,
Pri beleco de okuloj, okulharoj, nigraj brovoj,
Badaĥŝanaj [3] rozaj lipoj, kristaldentoj, ĉarma kolo,
Sur amboso plumba, mola ja rompiĝis eĉ la ŝtono.
6.
Mi bezonas miajn vortojn, koron arton nun apliki,
Dio donu al mi forton kaj racion utiligi,
Ja pri Tariel' [4] en versoj indas tutan veron diri,
Kaj pri tri herooj, kiuj kunbatalis kaj amikis.
7.
Ni kunvenu kaj sidiĝu, verŝu malsekigajn larmojn,
Tariel': similan homon ĉu jam vidis la homaro?
Rustaveli, mi, eksidis kun korvundo, ama fajro,
Kaj versigis la rakonton, kiel brilan juvelaron.
8.
Mi, poeto Rustaveli, faris tion en torturo,
Ŝin [5] obeas regimentoj, por ŝi estas mi mortulo,
Mi nenie trovis helpon, kuracilon, proksimulon,
Vi mortigu min aŭ donu resanigon al miĝnuro.
9.
Jen elektis mi la persan historion por la temo,
Kartveligis ĝin kaj faris tre ŝatatan mi aferon,
En versaĵon transformigis, kreis belan mi poemon,
Ĝin transdonu homaj manoj kiel admirandan gemon.
10.
Ŝi blindigis min, poeton, sed mi revis pri l' reĝino,
Enamiĝis mi kaj tial migras tra la mond' sen fino,
Forbruligu ĝi la korpon, nur ekĝoju la animo,
Tri herooj kante gloros mi en panegiraj rimoj.
11.
Ĉiu devas kontentiĝi, kion donas la kreinto:
Laborulo pri laboro, batalanto pri milito.
La miĝnur' ekkonas amon, kvankam restas turmentito,
Al neniu li malhelpu kaj ne kaŭzu do aflikton.
12.
De komenco poezio estas parto de la scio,
Ĝi ekzistas por legantoj, diajn farojn faras dio,
Ŝatas ĝin prudenta homo, kiu volas scii ion.
Parolado longa etas, jen valor' de poezio.
13.
Ekzameno por ĉevalo estas longa galopado,
Sur areno oni vidas kiel lertas pilkludanto,
Ankaŭ la poeto estas rekonebla en verkado,
Sed la vortoj ne sufiĉas – verso estas turmentado.
14.
Ĉu dubinda poetaĉo povas verki kaj ŝairi [6] ?
La kartvelan li ne scias kaj la vers' ne povas iri.
Ĉu multvorta babilulo povas ion taŭgan diri?
Ĉu li frapas per ĉogano [7] brave, ke nur indas miri?
15.
Ĉu jam estas la poeto, kiu du-tri versojn rimas?
Lin la homoj ne agnoskas kaj leganto ne estimas,
Kvankam tia poetaĉo kun aplombo laute krias:
"Mia verso, la plej bona"; kiel mulo li obstinas.
16.
Due, estas fuŝpoetoj, kiuj kreas sensencaĵojn,
Ne kapablas ili verki emociajn do versaĵojn,
Malsukcese ili skribas, faras ĉiam la stultaĵojn,
Ne mortigas ili beston – nur malgrandan do ĉasaĵon.

17.
Tria spec' de poezio por kantado ege bonas,
Dum festeno kun fidelaj kamaradoj ĝi imponas,
Kaj plezuron, bonhumoron al la aŭskultantoj donas,
Nur verkinton de poemo granda ni poeto nomas.

18.
Do poeto la talenton devas ne elspezi vane,
Unusolan belulinon li adoras arde, ame,
Nur pri ŝi li devas verki, glori, laŭdi ŝin konstante,
Kaj por ŝi parolo lia sonas ĉiam dolĉe, kante.

19.
Nun vi scias, kiun arde mi en la poemo gloras,
Por mi estas la honoro, ŝin prikanti mi ne hontas,
Ŝi por mi tigrino estas, vane mi ne fanfaronas,
Kaj per versoj de l' poemo la reĝinon mi honoras.

20.
Diros mi, ke vera amo estas sento altspirita.
Malfacile esprimebla, nur por noblaj destinita.
Ĝi al ni flugilojn donas, por ĉielo ĝi kreita,
Kiu volas ĝin ekkoni, estu ja la amo inda.

21.
Tian amon ne komprenas homa saĝo kaj genio,
Ĉar laciĝas niaj sensoj kaj samtempe la racio.
Mi ĉi tie gloras amon, teran senton kaj pasion,
Ne malĉaston, ne fiaĵon – fortan homan emocion.

22.
"Amo estas frenezaĵo", la araba saĝo diras,
Ĉar miĝnuro nevidante amatinon, freneziga.
Malespero tiam unujn al pieco forte ligas,
Sed aliaj kun virinoj amindumi nur deziras.

23.
Do miĝnuro devas esti tiel bela kiel suno,
Saĝa, riĉa, bona, juna, ŝia paro: egalulo,
Devas li necese venki kontraŭulon en la lukto;
Ne havante ĉion tion, li ne estas la miĝnuro.

24.
Vera amo – bela speco, ĉielalta la ĝuado,
Estas ĝi nekomparebla kun malĉasto, delogado,
Do ne miksas la saĝuloj ĝin kun distro kun konatoj,
Kredu vi al mi, poeto, ĝusta estas parolado.

25.
La miĝnuro devas esti pura, nobla de deveno,
Se disiĝas de virino, havu en la koro splenon;
Lin, konstantan kaj fidelan, plibeligas nur plorĝemo.
Mi malŝatas ŝmacajn kisojn kaj senkorajn

ĉirkaŭpreojn.

26.
Kaj ne donu nomon "amo" al ŝajniga koketado,
Kiu ŝanĝas ĉiutage la objekton de la amo,
Tiel ofte en la vivo ludas vanta junularo;
La miĝnur' nur tiu estas, kiu venkas delogadon.

27.
Plena de misteroj diaj devas esti vera amo,
Oni ĝin ne rajtas tuŝi per malmilda, kruda mano,
La miĝnuro do suferas, sole vagas en kamparo,
Eĉ se amatin' koleras, li konservas sian ravon.

28.
Li ne devas al la homoj montri sian ekzaltiĝon
Kaj ne povas ĝemi, krei por la homa amasiĝo.
Li nur devas kaŝi amon – ne elmontri al publiko,
La sufero pro la amo al li ŝajnu nur feliĉo.

29.
Kiu diras amsekretan, ĉu konfidon li meritas?
Tia homo sian propran senton tute neniigas,
Li kaj ŝi eksentas honton, se sekreto disvastiĝas,
Kaj ĉu sian amatinon tiel dolorigi indas?

30.
Miras mi, se la amanto pri la amo nur babilas,
Se ne amas – malestimas, tio vere ĝin signifas.
Li per vana babilado sian celon ne atingas,
Fia homo fian vorton kun plezuro ĉiam diras.

31.
Se miĝnuro pro la amo kun la larmoj multe ploras,
Tio ĉi signifas vere – li amanto esti povas,
Kaj interne en la koro nur vizaĝo ŝia floras,
Tamen estas ja pli bone, se li amon ne elmontras.

[1] *Miĝnuro – suferanta enamiĝinto (arabe).*

[2] *Rustaveli subkomprenas la edzon de reĝino Tamari, David-on*

[3] *Badaĥŝan – loko en Pamiro, kie oni elterigas rubenojn.*

[4] *Tariel' – heroo de "Kavaliro en tigras felo". (En la poemo propraj nomoj estas akcentataj laŭ la normala sistemo de Esperanto. Tariel' = Tarielo kun elizio.*

[5] *Rustaveli subkomprenas reĝinon Tamari.*

[6] *ŝairi – verki ŝairon. (ŝairo: 16-silaba verso).*

[7] *ĉogano – longa bastono, kun kiu oni pilkludis sur ĉevaloj.*

1-a Nokto

Ŝahrazad diris:

Mi aŭdis, ho bonŝanca reĝo, ke riĉa komercisto, kiu havis multajn komercajn aferojn tra la landoj, forrajdis unu tagon por iri negoci pri unu el siaj komercaj aferoj. Kiam la vetero varmiĝis, li eksidis sub arbo kaj ŝovis sian manon en sian selo-sakon el kiu li elprenis pecon da pano kaj daktilon. Li manĝis ilin kaj kiam li finis, li forĵetis la kernon de la daktilo, kaj je tio grandega ifrito aperis kun glavo enmane. La feo venis al la komercisto kaj diris: “Leviĝu, por ke mi povu mortigi vin, kiel vi mortigis mian filon.” “Kiel mi mortigis vian filon?” demandis la komercisto kaj la feo diris: “Kiam vi manĝis la daktilon kaj forĵetis ĝian kernon, ĝi frapis mian filon en la brusto dum li estis promenanta, kaj li tuj mortis.” “Ni apartenas al Dio kaj al Li ni revenos,” recitis la komercisto, aldonante: “Ne ekzistas forto kaj potenco krom Dio, la Superega, la Ĉiopova. Se mi mortigis lin, tio estis pro hazardo, do bonvolu pardoni min.” “Mi devas mortigi vin”, insistis la feo, kaj li elprenis la komerciston, kiun li ĵetis surteren kaj li levis sian glavon por bati.

Kun larmoj en siaj okuloj, la komercisto ekkriis: “Mi konfidas mian aferon al Dio!” kaj li recitis la jenajn versojn:

*Temp' konsistas el du tagoj, la sekura, la danĝera,
En la vivo estas duonoj, la feliĉa, la sufera.
Diru al la riproĉantoj pri la tempo-manipuloj:
Ĉu la tempo kontraŭstaras, ĉiujn au nur la grandulojn?
Kiam ŝtorma vento blovas, nur la altaj arboj knaras.
Kaj kadavroj tuj aperas kaj videble plu surmaras
dume perloj en profundo kuŝas kaŝe kaj silente.
Eble tempo traktos mise, nin konstante kaj turmente.
Nur la sun' kaj lun' eklipsas, el ĉielaj ĉiuj steloj.
Sur la ter' ekzistas branĉoj, kun malsekaj, sekaj ŝeloj,
Sed nur tiuj fruktoportaj estas niaj ŝtonaj celoj.
Oni tagojn ĝuas multe, kiam ili estas bonaj,
Do ne timu la malbonon, kiam tagoj estas dronaj.*

Kiam li finis, la feo diris: “Ĉesu paroli, ĉar je Dio, mi tutcerte tuj mortigos vin.” “Ifrito,” la komercisto diris: “Mi estas riĉa viro, kun edzino kaj infanoj; Mi havas ŝuldojn kaj mi posedas deponaĵojn, do lasu min iri hejmen kaj donu al ĉiuj tion, kion ili rajtas havi, antaŭ ol mi revenos al vi en la komenco de la nova jaro. Mi ĵuras solene kaj per Dio, ke mi revenos al vi kaj ke vi povos fari kion ajn vi volas al mi. Dio estos la

garantianto de tio.” La feo fidis lin kaj lasis lin foriri, post kio la komercisto iris hejmen, aranĝis siajn aferojn, kaj donis al ĉiuj tion, kion ili rajtis havi. Li rakontis al sia edzino kaj infanoj tion, kio okazis, donis al ili siajn instrukciojn kaj restis kun ili ĝis la fino de la jaro, kiam li leviĝis, elfaris la ceremonion de purigado (1) kaj, kun lia mortotuko sub sia brako, adiaŭis sian familion kaj ĉiujn konatojn kaj najbarojn kaj survojiĝis kontraŭvole, dum la aliaj ploregis kaj ĝemis. Li venis al la fruktoĝardeno en la Novjara tago, kaj sidante tien ploregis pro sia sorto, kiam tre maljuna viro, kiu kondukis gazelon per ĉeno, alproksimiĝis lin. La noveveninto salutis lin kaj demandis, kial li estis sidanta sole, en loko vizitata de feoj. La komercisto rakontis pri lia renkonto kun la feo, kaj la maljunulo ekkriis: “Je Dio, frato, vi estas tre pia viro kaj via rakonto estas tiel mirinda, ke se ĝi estus skribite per kudriloj sur la anguloj de la homaj okuloj, ĝi estus leciono por tiuj, kiuj estas lernemaj.

Li prenis sidlokon apud la komercisto kaj promesis ne lasi ĝin ĝis li vidos tion, kio okazis al li kun la feo. Dum la du sidis kaj parolis, la komerciston supervenkis timo kune kun ĉiam kreskanta premado kaj angoro. Estis ĉe tiu punkto ke dua maljunulo alvenis, kaj kun li estis du nigraj persaj lepor-hundoj (2). Salutinte la du virojn, li demandis, kial ili estas sidantaj en ĉi tiu loko vizitana de feoj, kaj la aliaj rakontis ĉion, de la komenco ĝis la fino. Post nelonge la nova veninto sidis apud ili, kiam tria maljunulo alvenis kune kun makulita mulo kaj salutante ilin li demandis kial ili estis ĉi tie, je kiu ili ripetis la tutan rakonton denove – sed estas neniu kialo ripeti ĉion denove ĉi tie.

Ĵus tiam, kiam la nova veninto sidiĝis, grandega polvo-diablo aperis en la mezo de la dezerto, malplenigante la vojon por montri ifriton kun elingigita glavo enmane, kiu estis elĵetanta fajrerojn el siaj okuloj. Li alvenis al la tri viroj, kaj trenis la komerciston el inter ili, kaj diris: “Leviĝu, por ke mi povu mortigi vin, kiel vi mortigis mian amatan filon.” La komercisto singultis kaj ploris, dum la tri maljunuloj verŝis larmojn, ploris kaj lamentis. Tiam la unua el ili, la viro kun la gazelo, forlasis la aliajn, kisis la manon de la feo kaj diris: “Mia feo, reĝa krono de ĝinoj, se mi dirus al vi la rakonton de mia rilato al ĉi tiu gazelo ĉu vi donus al mi trionon de la sango de ĉi tiu komercisto?” La feo jesis fari tion, se la rakonto ŝajnus mirinda al li, KAJ TIEL LA MALJUNULO KOMENCIS LA RAKONTON:

Dum un jaro mi restis malĝoja en la koro kaj kun

larmoj ĝis Id al-Adha (3) alvenis kaj mi alvokis la paŝtiston alporti al mi dikan bovinon. Tio, kion li venigis al mi estis mia sklavino, kiun mia edzino magie transformis. Mi refaldis miajn vestojn, prenis la tranĉilon enmane kaj mi preskaŭ estis buĉonta ŝin, kiam ŝi ekkriis, kriegis kaj ploris. Tio mirigis min kaj, sentante kompaton al ŝi, mi lasis ŝin kaj diris al la paŝtisto venigi al mi alian bovinon. Je tio mia edzino vokis al mi: 'Mortigu ĉi tiun, ĉar mi ne havas pli bonan aŭ pli dikan bovinon.', Mi denove elprovis la mortigon kaj denove la bovino ekkriis je kio mi diris al la paŝtisto, ke li mem buĉu kaj dehaŭtu ŝin. Li faris tion, sed li malkovris ke estis nek viando nek graso en la kadavro, sed nur haŭto kaj ostoj. Mi bedaŭris tion, kion mi faris, kiam bedaŭro ne plu estis utila, kaj mi donis la bovinon al la paŝtisto, petante, ke li alportu al mi grasigitan bovidon. Li venigis min mian filon, kaj kiam ĉi tiu bovido ekvidis min, li rompis sian ŝnuron kaj ruliĝis en la grundo antaŭ mi, kriegante kaj verŝante larmojn. Denove mi sentis kompaton kaj diris al la paŝtisto forlasi la bovidon kaj alporti al mi bovinon kaj denove mia edzino, kiu estas nun ĉi tiu gazelo, vokis al mi, insistante ke mi buĉu la bovidon en ti tago. 'Ĉi tiu estas nobla kaj benita tago,' ŝi atentigis. 'Oferdono devas esti bona kaj ni havas nenion pli dikan aŭ pli bonan ol tiu bovido.' 'Rigardu tion, kio

okazis kun la bovino, kiun vi volis, ke mi mortigu. Tio kondukis al seniluziigo kaj ni akiris nenian bonon. Tio nur lasis al mi bedaŭron. Ĉi foje mi ne faros tion, kion vi diras kaj ne mortigos tiun bovidon.' 'Je Dio, la Ĉiopova, la Kompatema, la Pardonanta, vi devas fari tion en ĉi tiu nobla tago, kaj se ne, tiam vi ne estas mia edzo kaj mi ne estas via edzino.' Aŭdinte tiujn severajn vortojn, sed ne rimarkinte kion ŝi intencis fari, mi alproksimiĝis la bovidon kun tranĉilo enmane.

Mateno nun aperis, kaj Ŝahrazad ĉesis paroli, laŭ la ricevita permeso. "Kia bona, agrabla, plezuriga kaj dolĉa rakonto ĉi tiu estas!" Ekkriis Dunjazad, je kio Ŝahrazad diris al ŝi: "Tio estas nenio kompare kun tio, kion mi rakontos al vi venontan nokton, se mi ankoraŭ vivas kaj la reĝo ŝparas min?" "Je Dio," la reĝo diris al si: "Mi ne mortigos ŝin, antaŭ ol mi aŭdos la reston de la rakonto, kaj poste ili pasigis la reston de la tempo brakumante unu la alian, ĝis la suno entute leviĝis. La reĝo tiam iris al sia kortego kaj la veziro alvenis kun la mortotuko sub sia brako, li donis siajn juĝojn, enoficigante kelkajn oficirojn kaj eloficigante kelkajn aliajn, ĝisvespere, sed kia surprizo por la veziro ke li ne donis instrukciojn pri lia filino. La kortego tiam estis ĉesigita kaj la Reĝo Ŝahrijar revenis al sia palaco.

(1) 'Ceremonio de purigado' estas korpa purigado de islamanoj antaŭ ol la preĝo.

(2) 'Saluki' aŭ persa lepor-hundo estas alta, rapida, maldika hundo kun silkeca tego, kaj kun grandaj mallevitajn orelojn kaj franĝitaj piedoj.

(3) 'Id al-Adha' estas la Festo de ofero, ankaŭ konata kiel Granda Bajram, kiu okazas la 10-an de Dhu'l-Hijj aŭ en la monato de haĝo aŭ pilgrimado. Dum tiu festivalo, tiuj islamanoj kiuj povas pagi havas devon oferi ŝafojn kaj bovojn aŭ kamelojn.

"Kavaliro en tigra felo" reeldonita!

(20/8/2018)

Ĝus aperis la dua eldono de la mezepoka kartvela poemego "Kavaliro en tigra felo" ĉe la eldonejo MAS. La papera libro konsistas el 332 paĝoj kaj kostas 14 eŭrojn. Aperis ankaŭ la elektronika versio en ePUB formato, kiu kostas nur 4,99 eŭrojn.

Mendu ĉe Eldonejo MAS, lutermano@gmail.com kaj baldaŭ ĉe UEA.

La Komisiono "Meza Oriento kaj Norda Afriko" de UEA helpas Esperanton tra sia regiono. Ĝi bezonas vian helpon. Donacu al la konto 'arabio' ĉe UEA.

Kavaliro en tigra felo

aŭtoro: Ŝota Rustaveli
 tradukinto: Zurab Makaŝvili
 revizzinto: Renato Corsetti
 serio: **MAS-libro #205**
ISBN: 978-2-36960-133-3



La “Kavaliro en tигра felo” estas granda poemo de la fama kartvela poemisto Ŝota Rustaveli, de la 12-a jarcento de nia erao.

La traduko al Esperanto estas farita de Zurab MAKASVILI. La 1-a eldono en Esperanto aperis en 1989 ĉe la eldonejo Sabĉota Sakartvelo en Tbiliso, ĝi estas delonge elĉerpita. Tiu ĉi reeldono estas prizorgita de Renato Corsetti, kiu esprimas sin admire pri la traduko:

“Zurab Makaŝvili faris mirindan laboron. Lia uzo de la dek-ses-silaba verso en Esperanto estas majstra. Mi dum la revizio de ĉi tiu eldono ŝanĝis nur kelkajn (malpli ol 5) vortajn elektojn kaj ĉefe forigis kelkajn skriberarojn kaj tre malofte ritmajn erarojn en la verso. [...]”

Mi mem respondecas pri ĉio lingva en ĉi tiu versio kaj pri restintaj eraroj.

Mi dankas la korektantojn de skrib-eraroj kaj de alispecaj eraroj: Anna Lowenstein kaj Anneke Schouten-Buys kaj Vasil Kadifeli, kiu helpis plurmaniere.”

الإسبرانتو .. لغة سهلة في متناول الجميع – Esperanto

(1/9/2018)

Esperanto – Facila lingvo alirebla por ĉiuj

Grupo de junaj sirianoj, kiuj interesiĝas pri redonado en la araba de sciencaj kaj kulturaj novaĵoj produktis ĉi tiun filmeton pri la bazaj informoj pri Esperanto en la araba:

Utiliginda por informado en arablingaj medioj.

<https://youtu.be/NVaxjKXqwWE>



Komisiono de UEA pri Meza Oriento kaj Norda Afriko

Esperanto sunumu – Prezento de Esperanto

(14/9/2018)

7 Eylül Cuma akşamı Büyükkada Çelik Gülersoy Kültür Merkezinde “Esperanto dili tanıtımı” ve “Esperanto diline bir giriş” sunumları yapıldı. Sunuma yaklaşık 25 kişi katılmasına rağmen bunlardan sadece 15'i kadarı bitirebildi. Esperanto diline giriş sunumu, dilin basit 16 dilbilgisi kuralına dayalı olarak verildi.

Bu sunuma şu sayfadan ulaşabilirsiniz:

Dilin 16 Kuralı Üzerinden Hızlı bir Esperanto Kursu

En la 7-a de septembro vendrede kaj vespere okazis prezentoj pri “Esperanto” kaj “Enkonduko al Esperanto lingvo” en Çelik Gülersoy Kultur-centro en Buyukada insulo (la plej granda el la princo-insuloj). Al la kunveno partoprenis preskaŭ 25 homoj, kvankam ĝin finis preskaŭ 15. La enkonduko al la lingvo estis prezento bazita sur la 16 gramatikaj reguloj de Esperanto.

La turklingvan enkondukan prezenton oni povas trovi en la jena ligilo:

Dilin 16 Kuralı Üzerinden Hızlı bir Esperanto Kursu





Esperanto diline bir giriş – Enkonduko al Esperanto lingvo

(14/9/2018)

Esperanto **dilinin 16 basit dilbilgisi kuralına dayalı** olarak hazırladığımız ve son iki yılda yaptığımız sunumlarda kullandığımız sunum artık daha rahat okunabilecek şekilde, 34 sayfalık, bol örnekli, ve sonunda kitaptaki örneklerde geçen 300'den fazla kelimeye dair bir sözlükle kitap haline getirildi.

Orijinal sunum:

Dilin 16 Kuralı Üzerinden Hızlı bir Esperanto Kursu


Yeni kitabı indirmek için aşağıdaki resim veya linkin üzerine tıklayabilirsiniz.

Ekde du jaroj ni kutimas fari rapidan enkondukon al Esperanto pere de prezento **bazita sur la 16 reguloj de la lingvo**. Ekde nun tiu prezento estos pli komforte uzata pere de la nova 34-paĝa libreto en kiu estas multaj ekzemploj kaj en ĝia fino troviĝas vortareto de pli ol 300 vortoj uzataj en la ekzemploj.

La originala prezento troviĝas en:

Dilin 16 Kuralı Üzerinden Hızlı bir Esperanto Kursu

Por elŝuti la novan libreton vi povas surklaki sur la bildon aŭ la ligilon sube



[https://mega.nz/#!UNxkRQQb!](https://mega.nz/#!UNxkRQQb!EEkAIE54cJliNYZffseK7AkDwG6tbrg82LJOuDFu2t0)

[EEkAIE54cJliNYZffseK7AkDwG6tbrg82LJOuDFu2t0](https://mega.nz/#!UNxkRQQb!EEkAIE54cJliNYZffseK7AkDwG6tbrg82LJOuDFu2t0)

Nia tunizia komisionano **Dorota Parzyszek** kun **Rene'e Triolle** reprezentis UEA-n dum forumo de Unesko en Tunizo 26-27 septembro 2018.

Jen raporto de Rene'e Triolle pri la partopreno en Unesko-kunvenon en Tunizio:

—
Tri forumoj sinsekvaj en luksa hotelo de Tuniso (Tunizio), pagitaj oficiale de Araba Instituto pri Homaj rajtoj, fakte de Kataro.

300 partoprenantoj, i.a la duono konsistis el la konataj NROj, kiuj regule kunvenas en Parizo, kaj alia duono estis araboj. Nur manpleno de afrikanoj, inter ili, unu studas en Parizo, alia migris al Kanado. Mi ne scias, ĉu "UNESKO" mem atentis pri ni, sed la NROj jes. Danke al la partopreno de Dorota, estis bela okazo montri, ke estas esperantistoj ĉie, ke UEA estas vere internacia (iuj miris, ke ni kapablas organizi jaran kongreson) kaj facile parolas la lingvon inter ni. La fakto, ke Dorota loĝas en Tunizio de 29 jaroj kaj ke ŝi estas afabla kaj malferma ankaŭ helpis.

Mi provis kontakti arabojn, disdonante la dokumenton de MONA, la prezenton de UEA en araba (pluraj preferis ĝin en la franca aŭ angla, ĉar edukitaj en okcidento) kaj anglan-francan tekston kaj broŝuron preparitan por socia forumo antaŭ kelkaj jaroj.

Malfacile interveni, ĉar entute ne estis diskutoj.

Forumo pri migrantoj: 26an-27an de septembro: mi partoprenis en la antaŭaj diskutoj en Parizo; estis kontaktita de la respondeculino (ĉar mi vojaĝis semajnon antaŭe tra la lando) por fari praktikajn proponojn, kiel gardi la junulojn en iliaj landoj por eviti, ke ili migru.

Forumo pri Paco: 28an; Filmo farita surbaze de la infanaj kontribuoj "Desegnu dronojn kaj robotojn pri Paco" la "organizantoj" petis, ke oni fortranĉu de la filmo la 2-minutan kontribuon de Israelo. La respondeculo miris, ke ne venis kontribuoj tra Esperanto (eble pro mia kulpo: mi sendis ĝeneralan informon sed certe estus pli trafe sendi al kelkaj instruistoj pri kiuj mi certas, ke ili kontribuos)

Forumo pri Homaj Rajtoj, la 29a sub prezido de sultano de Kataro.

Alparolis la ministro pri edukado de Tunizio (tiam ne funkciis la samtempa tradukado araba-franca-angla); pliboniĝis, kiam alparolis la ministro pri kulturo; Nada Al-Našif, vicdirektorino de UNESKO pri sociaj kaj homaj sciencoj; Anna-Maria MAJLOF, fakulino pri programo, sekcio inkludo kaj rajtoj, sektoro de sociaj kaj homaj sciencoj ĉe UNESKO, diversaj prezidantoj de Homaj Rajtoj en Magrebo, Teresa Albero, estrino de Buroo de Alta komisarejo de UN en Tunizio; Mohamed Al Nsour, regiona prezidento de la regiono MONA de la Alta Komisarejo de UN pri homaj rajtoj, diversaj ĵurnalistoj, ĉiuj kun belaj vortoj, kiujn oni aplaudas. Malfacilis rekte kontakti ilin, ĉar ili sidis sur la podio, alparolis, kaj fuĝis.

Survoje al vizito de muzeo, mi sidis en la aŭtobuso apud Tomislav Bracanovic, eksperto de la Komitato Etiko kaj Teknologio COMEST ĉe UNESKO: li faris (en la angla) tiun demandon "Krom vi, kiu parolas Esperanton en la aŭtobuso?" al kio mi respondis "Kiu parolas islande, latve, aŭ ĉine?", evidente neniu kaj ŝajne li konsciis pri la diskriminacio kontraŭ malgrandaj lingvoj kelkaj lasis sian adreson. Do ni provos plu kontakti ilin, minimume per sendo de la informilo "UN kaj ni".

Mi verkos pli kompletajn raportojn kaj artikolon por "Esperanto" kaj "UN kaj ni".



Karaj geamikoj,

שלום חברים,

Dimanĉe 28.10 okazis en Tel-Avivo kunveno de la Israela Tradukista Asocio (ITA), kiu estis plene dediĉita al Esperanto (https://ita.org.il/?page_id=728&lang=en). Ĝi daŭris de 17-21, kaj partoprenis ĉ. 50 personoj. Mi rakontis pri kio estas E-o kiel ĝi evoluis, kaj kion eblas fari per ĝi, kun aparta emfazo pri literaruto kaj tradukoj. Tali rakontis pri denaskuloj kaj kiel ŝi perceptas la lingvon, kreskinta kun E-o kiel patrolingvo. Sekve ŝi rakontis pri eŭritmio kaj eŭritmia koreografio en Esperanto, kaj prezentis mallongan Eŭritmian dancon laŭ originala E-teksto. Post la Vespermanĝo mi faris koncizan lecionon de E-o, por demonstri kiel lingvo povas esti simpla kaj facila, sed samtempe riĉa, esprimiva kaj fleksebla. Mi invitis la aŭskultantojn viziti la Tel-Avivan klubon, kaj eĉ la Israelan Kongreson en aprilo, post ioma lernado de E-o rete aŭ en la komencanta kurso en Tel-Avivo, planata komence de 2019. Estis bonaj reagoj, oni aĉetis kelkajn E-librojn, aparte la E-tradukon de Amos Oz.

Ĉeestis du e-istoj (Anat kaj Shlomo), iama lernatino de E-o en Kievo (kiu sufiĉe bone parolas) kaj iama lernanto de Matilda.

Oni publikigis fotojn kaj reagojn pri la evento en la Facebook-paĝo de la Tradukista Asocio, kiu dum kelkaj tagoj antaŭ la evento apfihis multe pri Esperanto:

<https://www.facebook.com/IsraelTranslatorsAssociation/>.

Amike,

Amri Wandel

Prezidanto de ELI

ביום ראשון 28.10 נערך בת"א מפגש של אגודת המתרגמים בישראל, אשר עסק כולו בשפת אספרנטו הכנס נמשך מ-17-21 והשתתפו כחמישים. איש. טלי ואני הצגנו הרבה חומר אודות אספרנטו ונושאים קשורים. סיפרתי על השפה, התפתחותה ושימושיה, עם דגש על ספרות ותרגום. טלי סיפרה על דוברים ילידים וכיצד גדלה עם אספרנטו כשפת אב. בהמשך סיפרה על אוריתמיה והציגה מחול קצר של קטע מקורי באספרנטו. אחרי ארוחת הערב ערכתי שיעור מבוא לאספרנטו, כדי להמחיש כיצד שפה יכולה להיות קלה ובעלת כושר הבעה רב. *dnhav* 'ופשוטה ובו בזמן עשירה הזמנתי את הנוכחים לבקר במועדון בת"א ואף בסופשבוע, אחרי לימוד ברשת או בקורס המתחילים שיפתח בפברואר. היו תגובות חיוביות, ואחדים קנו ספרי אספרנטו, בעיקר את התרגום של עמוס עוז.

נכחו שניים מחברינו (ענת ושלמה), וכן תלמידי אספרנטו לשעבר – אחת שלמדה בקייב (ומדברת לא רע) ואחד שלמד אצל מתילדה. תמונות ותגובות התפרסמו באתר הפייסבוק של אגודת המתרגמים,

<https://www.facebook.com/IsraelTranslatorsAssociation/>.

אשר פרסם הרבה חומר על אספרנטו כבר מספר ימים לפני, הארוע. עמרי



2-a Nokto

Kiam estis la dua nokto, Dunjasad diris al Ŝahrazad: “Fratino, finu vian rakonton de la komercisto kaj la ifrito por ni.” “Kun plezuro,” respondis Ŝahrazad “se la reĝo donas al mi permeson,” kaj kiam la reĝo donis permeson, ŜI DAURIGIS LA RAKONTON:

Mi aŭdis, ho bonŝanca reĝo kaj ĝuste gvidata reganto, ke kiam la komercisto estis tranĉonta la gorĝon de la bovido, li estis kortuŝita de kompato kaj diris al la paŝtisto teni la bovidon inter la aliaj bestoj.

La feo estis aŭskultanta kun miro, kion la maljunulo estis diranta pri la gazelo KAJ LA VIRO DAŬRIGIS:

Sinjoro de la reĝoj de la feoj, dum ĉio ĉi okazis, mia edzino, nun ĉi tiu gazelo, estis rigardanta kaj diranta al mi mortigi la bovidon, ĉar ĝi estis grasa, sed mi ne povis konvinki min fari tion kaj tiel mi diris al la paŝtisto forporti ĝin kaj li tion faris. La venontan tagon, kiam mi estis sidanta tie, li revenis al mi kaj diris: “Mi havas ion por diri al vi, kiu plaĉos al vi, kaj vi ŝuldos al mi rekompenco pro mia bona novaĵo.” Mi konsentis pri tio kaj li daŭrigis: “Mastro, mi havas filinon kiu, kiel juna knabino, estis instruita pri magio de maljunulino, kiun ni gastigis ĉe ni. Hieraŭ, kiam vi donis al mi la bovidon, mi iris al la knabino kaj, kiam ŝi ekvidis ĝin, ŝi kovris sian vizaĝon kaj verŝis larmojn sed poste ŝi ekridegis. Tiam ŝi diris: “Patro, ĉu vi min taksas tiel malmultekosta, ke vi alportas strangajn virojn al mi?” “Kie estas tiuj strangaj viroj,” mi demandis, “kaj kial vi ridas kaj ploras?” Ŝi diris: “Ĉi tiu bovido, kiun vi kunhavas, estas la filo de nia Mastro, li kaj lia patrino estis sorĉitaj de la edzino de lia patro. Jen kial mi ridis, sed la kialo, pro kiu mi ploris, estis, ke lia patro mortigis lian patrinon.” Mi estis konsternita de tio kaj kiam mi konstatis ke jam estis mateno, mi venis diri tion al vi. ‘

Kiam mi aŭdis tion, kion la viro devis diri, mi eliris kun li, ebria, kvankam ne pro vino, sed per la ĝojo kaj gajeco, kiun mi sentis. Kiam mi alvenis al la domo de la paŝtisto lia filino bonvenigis min, kisis miajn manojn, dum la bovido venis kaj ruliĝis sur la tero antaŭ mi. Mi demandis ŝin: “Ĉu tio, kion vi diras pri tiu bovido estas vera?” “Jes, sinjoro,” ŝi certigis min. “ Jen estas via karulo, via filo. “Knabino,” mi diris al ŝi,”se vi liberigos lin, vi povos havi ĉiujn bestojn kaj ĉion alian, pri kio via patro zorgas.” Ŝi ridetis kaj diris: “Mastro, mi nur volas tion en du kondiĉoj, la unua estas ke vi edziniĝu min

al li, kaj la dua estas, ke mi estu permesita meti sorĉon sur tiun, kiu sorĉis lin kaj tenu ŝin limigita, ĉar alie mi ne estos sekura de ŝiaj intrigoj.”

Kiam mi aŭdis tion, kion ŝi devis diri, mi promesis doni al ŝi tion, kion ŝi volis kaj ankaŭ ĉion en la zorgo de ŝia patro, aldonante ke mi eĉ donos permeson mortigi mian edzinon. Je tio, ŝi prenis bovlon, plenigis ĝin per akvo kaj recitis sorĉan diraĵon sur ĝi, post kiu ŝi ŝprucis la akvon sur la bovidon, dirante: “Se vi estas bovido kaj tiel vin kreis la Ĉiopova Dio, restu en ĉi tiu formo kaj ne ŝanĝiĝu, sed se vi estas sub sorĉo, tiam revenu al via originala formo kun la permeso de la Ĉiopova Dio.” La bovido ekstremis kaj fariĝis viro, je kio mi falis sur lin, kaj diris: “Je Dio, diru al mi, kion mia edzino kaj via patrino faris al vi.” Li rakontis al mi tion, kio okazis, kaj mi diris: “Mia filo, Dio sendis al vi savanton por restarigi viajn rajtojn.” Mi tiam edzinigos la filinon de la paŝtisto al li kaj ŝi transformis mian edzinon en ĉi tiu gazelo, dirante: “Jen estas bela formo, nek bruta nek forpuŝa al la okuloj.”

La knabino restis kun ni dum iom da tempo ĝis Dio elektis preni ŝin al Si kaj mia filo foriris al Hindujo, la lando de la homoj kun kiuj vi havis tiun sperton. Mi prenis mian edzinon, tiun gazelon, kaj vojaĝis de loko al loko serĉante novaĵojn de li ĝis la sorto venigis min ĉi tien, kaj mi vidis ĉi tiun komerciston sidantan kaj plorantan. Jen mia rakonto.

“Ĝi ja estas mirinda rakonto,” la ifrito konsentis, “kaj mi donos al vi trionan parton de lia sango.”

Ĉe tiu momento, la maljunulo kun la du persaj lepohundoj eliris kaj demandis al la ifrito: “Se mi dirus al vi, kion okazis al mi kaj miaj fratoj, tiuj du hundoj, kaj vi trovus ĝin kiel la plej mirinda kaj miriga el la rakontoj, ĉu vi donus al mi trionon de la ofendo de tiu homo?” La feo konsentis KAJ LA VIRO KOMENCIS:

Sinjoro de la reĝoj de la feoj, tiuj du hundoj estas miaj fratoj, mi estas la tria. Je lia morto mia patro heredigis al ni tri mil dinarojn kaj ĉiu el ni malfermis vendejojn por komerci. Mi ne estis tie dum longa tempo, kiam mia plejaĝa frato, nun unu el tiuj hundoj, vendis la enhavon de sia vendejo por mil dinaroj, aĉetis komercajn varojn kaj ekiris al vojaĝo.

Li estis for dum tuta jaro, kiam iun tagon, en kiu mi estis en mia vendejo, almozulo venis al mi kaj haltis. Mi deziris al li bonon, sed li diris, plorante: “Ĉu vi ne

konas min plu?” Kiam mi rigardis lin atente, mi vidis, ke tiu estas mia frato kaj mi ekstaris por bonvenigi lin, poste mi kondukis lin en la vendejo. Mi demandis lin, kiel li fartas kaj li diris: “Ne demandu. Mia riĉeco perdiĝis kaj mia situacio ŝanĝiĝis.” Mi kondukis lin al la banejoj, donis al li kelkajn el miaj propraj vestoj kaj tiam kondukis lin hejmen. Tiam mi kontrolis miajn kontojn kaj la figurojn de vendado de mia vendejo kaj mi trovis, ke mi faris profiton de mil dinaroj sur kapitalo de du mil. Mi kundividis tiun kun mia frato, kaj diris al li, ke li forgesu, ke li iam vojaĝis eksterlanden. Li prenis la monon volonte kaj malfermis alian vendejon.

Post iom da tempo, mia dua frato, nun tiu alia hundo, vendis ĉiujn siajn havaĵojn, kun la intenco vojaĝi. Ni provis sensukcese haltigi lin, sed li aĉetis komercajn varojn kaj ekiris kun kelkaj aliuloj. Li ankaŭ elspezis tutan jaron fore antaŭ ol kiam li revenis al mi en la sama stato kiel mia unua frato revenis. “Frato,” mi diris al li, “ĉu mi ne diru al vi, ke vi ne foriru?” Sed li respondis: “Tio estis dekreto de sorto, kaj jen ĉi tie mi estas, malriĉulo, sen mono kaj eĉ sen ĉemizo.” Mi kondukis lin al la banejoj kaj donis al li novajn vestaĵojn el la miaj por surmeti antaŭ ol mi kondukis lin al mia vendejo, kie ni tiam manĝis kaj trinkis. Mi diris al li: “Frato, mi kontrolas la kontojn de mia vendejo unufoje per jare kaj iu ajn superfluon, kiun mi trovos, mi kundividos kun vi.” Kiam mi faris la kontroladon mi trovis ke mi havas dumil dinarojn, kaj post laŭdante la Superan Kreinton, mi donis al li mil kaj tenis la aliajn mil por mi mem.

Mia frato malfermis alian vendejon, sed post kelka tempo li kaj mia alia frato proponis al mi, ke mi iru for kune kun ili al vojaĝo. Mi rifuzis, petante: “Kion vi ricevis de viaj vojaĝoj, por igu min imagi, ke mi ankaŭ povos fari profiton?” Mi rifuzis aŭskulti ilin kaj ni restis tie, komercante en niaj vendejoj. Ĉiujare ili faris la saman proponon al mi kaj mi ne konsentis, ĝis post ses jarojn, kiam mi fine akceptis kaj diris al ili, ke mi iros kun ili. Mi petis ilin montri al mi kiom da mono ili havis, nur por malkovri, ke ili havas nenion, ili malŝparis ĉion pri manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj amuzaĵoj. Mi ne diris eĉ unu vorton al ili sed kontrolis la kontojn de mia vendejo kaj vendis ĉion, kion mi posedis kune kun la tutaj varoj en mia vendejo, kio lasis min, kun mia plezuro, tuton de ses mil dinaroj. Mi duonigis ĝin kaj diris al miaj fratoj, ke ili kaj mi povos havi tri mil dinarojn, per kiuj ni komercos, dum mi enterigis la ceterajn tri mil en okazo, ke la samo okazos al mi kiel ĝi okazis al ili. En tiu okazo mi havus monon sufiĉan por permesi nin remalfermi niajn vendejojn. Ili

konsentis pri tio kaj mi enmanigis al ĉiu de ili po mil dinarojn, gardante mil por mi mem.

Ni provizis nin per ĉio, kion ni devis havi, kiel komercajn varojn kaj faris nian preparadojn por vojaĝi, ni luis ŝipon kaj ŝarĝis niajn varojn surŝipe. Post tuta monato de vojaĝo ni portis ilin al urbo, kie ili venigis al ni dekoblan profiton. Ni preskaŭ estis ekveturontaj denove, kiam sur la bordo ni renkontis knabinon vestita en ĉifonoj kaj pecetojn de ŝtofoj. Ŝi kisis mian manon kaj demandis ĉu mi estis bonfara viro, en kiu okazo ŝi rekompencus min. “Mi amas bonfaradon kaj bonajn farojn,” mi diris al ŝi, “eĉ se vi ne donus al mi rekompencan.” “Edzinigu min, sinjoro,” ŝi diris, “kaj portu min al via lando. Mi donos min al vi; vi traktu min afable, ĉar mi estas iu, kiu meritas afablecon kaj donacemon. Mi repagos vin pro tio kaj ne estu trompita de la stato, en kiu mi estas nun.”

Kiam mi aŭdis tion, mi sentis deziron al ŝi, kiel Dio, la Granda kaj Glora, ordonis per dekreto, kaj tial mi prenis ŝin, donis al ŝi vestojn kaj provizis ŝin per elegante meblitan loĝejon sur la ŝipo. Mi traktis ŝin kun respekto kaj ĉar niaj vojaĝo daŭris mi falis en amo tiel profunda por ŝi, ke mi ne povus toleri forlasi ŝin nokte aŭ tage. En mia maltrankvilo por ŝi mi neglektis miajn fratojn, en kiuj kreskis envio por mi, pro mia riĉeco kaj pro la kvanto de miaj posedaĵoj. Ili pasigis sian tempon rigardante ĉion ĉi, kaj ili diskutis mortigi min kaj preni kion ajn mi havis, dirante: “Ni mortigu nian fraton kaj tiam ĉio ĉi estos nia.” Satano faris tiun ideon plaĉa al ili kaj tiel, trovinte min sola kaj dormanta apud mia edzino, ili kaptis ambaŭ nin kaj ĵetis nin el la ŝipo.

Mia edzino vekiĝis; tremo trakuris ŝin kaj ŝi iĝis feino. Ŝi tiam portis min al insulo, kie ŝi forlasis min dum mallonga tempo post kiam ŝi revenis frumatene kaj diris: “Mi estas via servanto kaj estis mi kiu savis vian vivon portante vin ĉi tien, kun la permeso de Ĉiopova Dio. Vi devas scii ke mi estas unu el la feoj kaj kiam mi vidis vin mi enamiĝis al vi, kiel Dio mem dekretis. Ĉar mi kredas je Li kaj je Lia Apostolo, Dio benu lin kaj donu al li pacon. Mi venis al vi surhavante ĉifonojn, kiel vi vidis, sed vi edziĝis al mi kaj nun mi savis vin de dronado. Mi estas kolera kontraŭ viaj fratoj kaj devos mortigi ilin.”

Kiam mi revenis hejmen vespere, mi trovis tiujn du hundojn ligitajn, kiuj kiam ekvidis min ili venis al mi kun larmoj en siaj okuloj kaj ligiĝis al mi. Antaŭ ol mi komprenis tion, kio okazis, mia edzino diris al mi: “Jen,

tiuj estas viaj fratoj.” “Kiu faris tion al ili?” mi demandis, kaj ŝi diris: “Mi sendis mesaĝon al mia fratino; ŝi estis tiu, kiu transformis ilin al hundoj kaj ili ne estos liberigotaj de la sorĉo antaŭ ol dek jaroj. “Miaj fratoj nun estas en tiu stato dum dek jaroj kaj mi estis sur mia vojo por liberigi ilin, kiam mi renkontis tiun viron. Li rakontis al mi sian historion kaj mi decidis ne forlasi lin, ĝis mi vidos tion, kio okazos inter vi kaj li. Jen mia rakonto.

Mi miris aŭdi tion kaj mi dankis ŝin pro tio, kion ŝi faris sed malpermesis al ŝi mortigi miajn fratojn. Mi tiam diris al ŝi la tutan historion de mia interrilato kun ili kaj tio instigis ŝin diri: “Ĉinokte mi flugos al ili, enprofundigos ilian ŝipon kaj detruos ilin.” Mi petegis ŝin en Dia Nomo ne fari tion, memorigante ŝin pri la proverbo kiu parolas pri tiuj kiuj bonfaris al tiuj kiuj faris malbonon al ili – “La agoj de malbonfaranto estas puno sufiĉa por li”- kaj notis, ke ĉiuokaze, ili estis miaj fratoj. Ŝi daŭris insisti, malgraŭ mia petegoj, kaj ŝi poste forflugis kun mi kaj metis min sur la tegmento de mia domo. Mi malfermis la pordon, elprenis la monon kiun mi enterigis kaj malfermis mian butikon, salutinte la homojn tie mi aĉetis varojn por komerci.

“Ĝi ja estas mirinda rakonto,” konsentis la ifrito, aldonante: “Mi donu al vi trionon de la sango, kiun li ŝuldas pro sia krimo.”

La tria maljunulo, kun la mulo, tiam ekparolis: “Se mi rakontus al vi pli mirindan rakonton ol tiuj du, ĉu vi donus al mi la ceteran trionon?” La feo konsentis KAJ LA HOMO DAŬRIGIS:

Sultano kaj ĉefo de la feoj, ĉi tiu mulo estis mia edzino. Mi estis for dum jaro en vojaĝo, kaj kiam mi finis miajn aferojn mi revenis al ŝi. Tio estis dumnokte kaj mi vidis nigran sklavon kuŝanta en la lito kun ŝi; ambaŭ parolis, flirtis, ridis, kisis kaj ludis unu kun la alia. Mia edzino ekvidis min kaj ekvenis al mi kun kruĉo plena de akvo super kiu ŝi eldiris sorĉon. Ŝi ŝprucis la akvo super mi kaj diris: “Lasu tiun formon de via kaj prenu formon de hundo” Kaj tuj mi fariĝis hundo kaj ŝi pelis min el la pordo de la domo.

Mi pluiris ĝis mi venis al vendejo de buĉisto, kie mi komencis mordi ostojn. La buĉisto vidis min kaj prenis min en sian domon, kie lia filino kovris sian vizaĝon antaŭ mi kaj diris: “Ĉu vi venigis viron al mi?” “Kie estas tiu viro?” demandis ŝia patro, kaj ŝi diris: “Tiu hundo estas viro super kiu lia edzino ĵetis sorĉon, sed mi povas liberigi lin de ĝi.” “Faru tion, je Dio,” diris ŝia patro, kaj ŝi prenis kruĉon kun akvo, parolis kelkajn vortojn sur ĝi kaj ŝprucis la akvon sur min. “Reiru al via originala formo,” ŝi diris, kaj tio estis kion mi faris.

Mi kisis la manon de la knabino kaj diris: “Mi dezirus, ke vi uzu vian magion por fari al mia edzino, la samo kion ŝi faris al mi.” Ŝi donis al mi iom da akvo kaj diris: “Kiam vi trovos ŝin dormanta, ŝprucu tiun akvon sur ŝi kaj diru tion, kion vi volas, ŝi fariĝos kion ajn vi volas.” Mi prenis la akvon kaj iris al mia edzino, kiun mi trovis dormanta. Mi ŝprucis la akvon sur ŝin kaj diris: “Lasu tiun formon kaj iĝu mulo” je kio ŝi fariĝis mulo tiam kaj tie, kaj estas ŝi kiun vi povas vidi, sultano kaj ĉefo de la reĝoj de la feoj.

“Ĉu tio estas vera?” La viro demandis la mulon, je kio la mulo kapjesis per sia kapo, transdonante la mesaĝon per gesto: “Tiu estas mia rakonto kaj tio estas, kio okazis al mi.” Kiam la maljunulo finis sian rakonton, la feo, tremante pro ĝojo, donis al li trionan rajton de la sango de la komercisto.

Mateniĝis nun kaj tagiĝis kaj Ŝahrazad ĉesis paroli laŭ la permeso donita al ŝi. “Kia bona, agrabla, plezuriga kaj dolĉa rakonto tiu estas!” ekkriis Dunjazad, je kio Ŝahrazad respondis: “Kiel ĉi tiu rakonto estos komparebla kun tio, kion mi rakontos al vi venontan nokton, se mi ankoraŭ vivos kaj la reĝo ŝparos min?” “Je Dio,” la reĝo diris al si: “Mi ne mortigos ŝin ĝis mi aŭdos la reston de tiu rimarkinda rakonto,” kaj tiel ili pasigis la reston de la tempo brakumante unu la alian ĝis la suno tute leviĝis. La reĝo tiam iris al sia kortego; la trupoj alvenis kune kun la veziro, kaj kiam ĉiuj estis tie, li donis lian verdikton, enoficigante iujn funkciulojn, adiaŭante aliajn, kaj donante ordonojn kaj malpermesojn ĝis vespero. La kortego tiam estis disigita kaj la reĝo revenis al sia palaco, kie, kiam noktiĝis, li kuŝis denove kun Ŝahrazad.

Karaj geamikoj,

Pli ol 30 s-anoj partoprenis 11.12

Zamenhofa Festo en Tel Avivo. En la distra parto estis prelego pri Zamenhof (Amir Naor) kaj kantoj (Israela, Luiza, Enrica kaj Doron/Amir), kaj eurtmia dancadoj (Tali), pluraj unuafoje prezentitaj, kiuj entusiasmigis la spektantojn. Fotoj kaj video videblas che https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10218091939679939

En la formala parto okazis diskutoj pri la novaj kotizoj de UEA kaj repago de elspezoj (prezentis Jehoshua), acheto de oficejo/klubejo en Tel-Avivo (Shlomo), kaj raportoj pri la agado en la pasinta jaro kaj la 20-Israela Kongreso en Eilat (Amri). Fine estis elektita estraro kaj kontrolkomisiono.

Pluraj utiligis la okazon por malplikoste alighi al la Israela Kongreso, kio ankau eblas por eksterlandanoj ghis la fino de decembro, antaupagante per UEA. Informoj kaj alighilo: http://esperanto.org.il/ik20-mona.html.

Amike,

Amri Wandel

Prezidanto de ELI

שלום חברים,

יותר מ-30 חברים השתתפו ביום שלישי בערב זמנהוף באולם בבית ויצו בת"א. בחלק האמנותי היו הרצאה על זמנהוף (אמרי), שירים (ישראלה ואניריקה בליווי ותרגום דרון ואמיר, וכן לואיזה) ומחול אוריתמי (טלי) רובם בביצועי בכורה שהלהיבו את https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10218091939679939

בחלק הרשמי היו דיונים ודיווחים בנושאים שונים - דמי החבר והחזר הוצאות נסיעה (הציג יהושע), רכישת UEA-החדשים ב משרד/מועדון בת"א (שלמה), פעילות האגודה בשנה שחלפה והכינוס באילת (עמרי). לבסוף נבחרו הנהלה וועדת ביקורת

חברים אחדים ניצלו את ההזדמנות להרשם במחירים מזלים שניהם עדיין אפשריים עד UEA-לכינוס האספרנטו באילת וכן ל סוף דצמבר, ע"י תשלום ליהושע. כל הפרטים והעלויות לכינוס באילת מופיעים בטופס ההרשמה באתר http://esperanto.org.il/IK20/index.php/ilAligxilo

שבת שלום,

עמרי

Artikolo pri Esperanto en loka gazeto

En la 14-a de decembro aperis artikolo pri Esperanto, okaze de nia kunveno por la Zamenhofa Tago la sekva tago sabate, en loka senpaga papera gazeto "Gazete Kadikoy" de Kadikoy municipo, la plej granda municipo de Istanbul kun pli ol unu miliono da loĝantoj.

Jen ligilo por la gazeto (vd paĝon 15) :

http://www.gazetekadikoy.com.tr/images/dosyalarim/967_sayipdf_a5c74.pdf

Jen la reta ligilo de la artikolo:

http://www.gazetekadikoy.com.tr/yasam/irksiz-cinsiyetsiz-bir-dil-esperanto-h13397.html

Ertesi gün gerçekleştireceğimiz Zamenhof Günü toplantısı vesilesi ile 14 Aralık günü İstanbul'un belki bir milyondan fazla yaşayarı olan Kadıköy belediyesinin ücretsiz yerel gazetesi "Gazete Kadıköy" de Esperanto ile ilgili bir makale yayınlandı.

İlgili gazete sayısına ulaşmak için (bknz sayfa 15) : http://www.gazetekadikoy.com.tr/images/dosyalarim/967_sayipdf_a5c74.pdf

Makalenin web sayfası için : http://www.gazetekadikoy.com.tr/yasam/irksiz-cinsiyetsiz-bir-dil-esperanto-h13397.html

Irksiz, cinsiyetsiz bir dil: "ESPERANTO"
Dünyada en çok konuşulan yapay dil olan Esperanto dilini konuşan Esperantistler Kadıköy'de buluşuyor.
Irksiz, cinsiyetsiz bir dil: "ESPERANTO"
Kongresin düzenlendiği "Yıldırım" da da ilk Esperanto Dünyada en çok konuşulan yapay dil olan Esperanto dilini konuşan Esperantistler Kadıköy'de buluşuyor.
Irksiz, cinsiyetsiz bir dil: "ESPERANTO"
Kongresin düzenlendiği "Yıldırım" da da ilk Esperanto Dünyada en çok konuşulan yapay dil olan Esperanto dilini konuşan Esperantistler Kadıköy'de buluşuyor.

Festo de Zamenhof Tago / Esperanto Libro Tagon en Turkujo

En la 15-a de decembro sabate en Turkujo (en Kadikoy distrikto de Istanbul) ni festis la Zamenhof Tagon aŭ Esperanto Libro Tagon pere de tuttaga kunveno. En la kunveno partoprenis 25 homoj kaj almenaŭ duono de ili estis homoj kiuj jam aŭdis pri Esperanto. Antaŭtagmeze oni prezentis en turka lingvo la historion de Esperanto kaj oni faris enkondukon al la lingvo surbaze de la 16 reguloj kiuj troviĝas en la Unua Libro. Oni ankaŭ spektis la video-gratulmesaĝojn kiuj venis el diversaj landoj por nia festo. Posttagmeze oni faris mallongajn prezentojn ĝenerale en Esperanto lingvo:

- * Kion ni faras POR Esperanto
- * Kion mi faris PER Esperanto
- * Mezoriantaj Kunvenoj en Turkujo
- * Kiel mi fariĝis esperantisto
- * Kiel mi lernis Esperanton
- * La tri Epopeoj de Esperantujo
- * Artefaritaj Lingvoj

Ni ankaŭ sukcesis aperigi artikolon pri Esperanto en papera loka gazeto. Jen ligilo al la reta blogaĵo de tiu artikolo en la blogretejo de la gazeto:

<http://www.gazetekadikoy.com.tr/yasam/irksiz-cinsiyetsiz-bir-dil-esperanto-h13397.html>

Zamenhof Günü / Esperanto Kitap Günü'nün Kutlanması

15 Aralık 2018 Cumartesi günü İstanbul Kadıköy'de Zamenhof Günü / Esperanto Kitap Günü tam günlük bir etkinlik ile kutlandı. Etkinliğe en az yarısı henüz Esperanto'yu yeni duymuş kişilerden meydana gelen toplan 25 kişi katıldı. Etkinliğin sabahki programında Türkçe dilinde Esperanto'nun ne olduğu anlatıldı ayrıca Unua Libro'daki 16 dilbilgisi kuralı üzerinden dile bir giriş yapıldı. Gelen video kutlama mesajları izlendi. Öğleden sonra ise çoğunlukla Esperanto dilinde kısa kısa bir çok sunum yapıldı:

- * Esperanto için neler yapıyoruz
- * Esperanto ile neler yaptım
- * Türkiye'de yapılmış MONA toplantıları
- * Nasıl esperantist oldum
- * Esperanto'yu nasıl öğrendim
- * Esperanto'nun üç epik şiiri (destanı)
- * Yapay diller

Ayrıca yerel Gazete Kadıköy baskılı gazetesinde de bir röportaj yayınlamayı başardık. Aynı gazetenin web sayfasındaki röportaja şu bağlantıdan ulaşabilirsiniz:

<http://www.gazetekadikoy.com.tr/yasam/irksiz-cinsiyetsiz-bir-dil-esperanto-h13397.html>



Yeni web “Esperanto Sözlüğü”müz hakkında

Türk esperantistlerin artık yeni bir Esperanto-Türkçe sözlüğü var. Arkadaşımız Ege Madra şahsi programlama çabaları ile son derece modern bir web sözlük uygulaması oluşturdu. Sözlük içeriği basit olsa da bugüne kadar en kapsamlı sözlük olarak düşünülebilir. 1. Gene web ortamında bulunan PIV sözlüğüne 2 göre sözlüğümüz oldukça dar kapsamlı ancak geliştirilmeğe müsait. Sözlük şu anda 6,000 civarında Eo->Tr yönünde kelime içermektedir. Bu 6,000 kelime ile kişi ileri bir seviyeye gelebilir. O noktadan itibaren ise PIV sözlüğünü kullanmaya başlayabilir. Ancak Tr->Eo kısmını doldurup zenginleştirdiğimizde Esperanto diline kaliteli tercüme yapmak için ekstra bir imkanımız daha olacaktır. Bu henüz beklemekte olan bir iş.

Sözlüğümüzün bazı özellikleri aşağıdadır.

Normal kullanıcı açısından baktığımızda:

1) Sözlük hem Eo->Tr hem Tr->Eo imkanı sunuyor. Şu anda Tr->Eo kısmı boş gibi ve bunun doldurulması için ek çalışma yapılması gerekiyor.

2) Kelime araştırırken giriş yapılan ilk bir kaç harf ile başlayan içerideki kelimeler görüntüleniyor ve seçim yapılabilir.

3) Seçilen kelime görüntülediğinde o köke dair diğer kelimeler de ekrana geliyor. Seçilen kelime ve anlamı yeşil fon ile işaretlenmektedir.

4) Fiillerde geçişli / geçişsiz özelliği bulunmaktadır.

5) “Okutman (Legasistanto)” imkanı ile herhangi bir metni bu ekrana kopyalayıp yapıştırarak oluşturulan metni okurken bilinmeyen kelime üzerine tıklayarak kelimenin Türkçe anlamına ulaşmak mümkün. Metni anlamak için sözlük karıştırmanıza gerek yok.

Sözlüğü geliştiren editörler tarafından baktığımızda:

1) Bu kısma şifre ile girilebilmekte.

2) En son yapılan güncellemelerden 40 tanesi detaylı olarak izlenebilmekte.

3) “Detaylı arama” ekranı ile kimin neyi, nasıl zaman girdiğini görülebilir, eksikler tespit edilebilir.

4) “Yeni Madde” ekleme ekranı ile doğrudan ve hızlı şekilde yeni kelime eklenebilmektedir. Ekleme yaparken PIV’e doğrudan ulaşım imkanı da mevcuttur.

5) “Metin Girişi” denilen ekrana hazır bir metni

kopyala yapıştır ile verdiğimizde sözlükte olan ve olmayan kelimeleri otomatik olarak tespit edebilmekteyiz.

6) “Ters Yüz” denen ekran aracılığı ile Eo->Tr tarafından rastgele kelimeler seçip bunları düzenleyip Tr->Eo tarafına aktarabiliyoruz.

7) Sözlük ile ilgili istatistikler alınabiliyor.

Sözlük bağlantısı: <https://tr-vortaro.info/>

Lütfen “sık kullanılan sayfalar” listesine ekleyin.

¹ *Bu noktada en son Esperanto Derneğinin başkanı Hayrettin Dural’ın bitirmeye çalıştığı “Esperanto-Türkçe Büyük Sözlük” çalışmasını anmadan geçemeyiz. Ne yazık ki Hayrettin Dural bu çalışmayı tamamlayamadan vefat etmiştir. Geliştirmeye çalıştığı sözlük son derece kapsamlı bir sözlüktü. Vefatından sonra sözlüğü onun anısına kızı Şeklen düzenleyip sınırlı sayıda bastırdı ancak sözlük kullanılabilmesi için çok fazla düzenlemeler, düzeltmeler ve uzun süreli bir çalışma gerektirmektedir.*

² <http://vortaro.net/>

Pri nia nova reta “Esperanto Vortaro”

La turkaj esperantistoj nun posedas novan “Esperanto-Turka” vortaron. Nia samideano Ege Madra pere de siaj propraj program-klopodoj realigis aplikaĵon pri nova kaj moderna vortaro. La enhavo de la vortaro estas simpla sed oni povas taksigi ĝin kiel la plej ampleksa vortaro kreita ĝis nun. La amplekso de nia vortaro kompare kun la ankaŭ reta PIV vortaro 2 estas limigita sed ĝi provizas la eblecon esti plibonigita. La vortaro nun enhavas ĉirkaŭ 6,000 vortoj. Tiuj 6,000 vortoj povas venigi la turkan lernanton al sufiĉe alta nivelo. Post tiu punkto la lernanto povas uzi la retan vortaron de PIV. Tamen, kiam ni plenigos kaj riĉigos la Tr->Eo parton, tiam la turka esperantisto fariĝos kapabla fari bonkvalitajn tradukaĵojn al Esperanto. Ĉi tiu estas tasko kiu ankoraŭ atendas laboron.

Kelkaj ecoj de nia vortaro estas la jenaj.

El la vidpunkto de la normala uzanto:

1) La vortaro funkcias aambaŭdirekte, kaj Eo->Tr

kaj Tr->Eo. Nuntempe la Tr->Eo flanko estas preskaŭ malplena kaj pro tio oni devas fari aldonan laboron.

2) Enirante literojn por serĉi vorton la vortaro montras vortojn, kiuj komencas per tiuj literoj kaj la uzanto povas elekti el ili.

3) La elektita vorto estas montrita sur la ekrano kune kun la aliaj vortoj rilataj al la sama radiko. La elektita vorto kaj ĝia signifo estas montrita sur verda fono.

4) La verboj ankaŭ havas la transitivan / netransitivan karakteron en la signifo.

5) "Legasistanto" estas funkcio, kiu ebligas la lernanton kopii kaj alglui en ĝi tekston kaj tiam la teksto estas transformita en tia formo ke klakanta sur iu ajn vorton, ties signifo estas montrita sur la ekrano. Do ne estas bezono trafolumi vortaron por kompreni la tekston.

El la vidpunkto de la vortaro-redaktistoj:

1) Oni uzas paskodon por eniri en tiu parto.

2) La 40 lastaj ĝustigoj en la vortaro estas detale kaj otomate videblaj.

3) Uzante la eblecon de "Detala Serĉo" oni povas spekti kiu, kion, kaj kiam enigis vortojn en la vortaro kaj tiel detekti mankojn kaj malĝustajn punktojn en la vortaro.

4) Oni povas rekte kaj rapide enigi vortojn per la

"Nova Vorto" ekrano. Kompostante la tekston oni povas ankaŭ atingi la signifon en vortaro PIV.

5) La ekrano "Enigi Tekston" provizas la eblecon al la redaktanto kopii en ĝi tekston kaj la vortaro tiam montras liston de la jam eksistantaj aŭ ne ekzistantaj vortoj en la vortaro.

6) La ekrano "Inversilo" provizas la eblecon aŭtomate montri vortojn el la Eo->Tr parto kaj ebligi la redaktanton enigi ilin rapide en la Tr->Eo flanko.

7) Estas la ebleco montri statistikojn el la vortaro.

La ligilo al la vortaro estas : <https://tr-vortaro.info/>

Bonvolu aldoni la ligilon en via listo de "ofte uzataj paĝoj"

¹ En tiu punkto ni devas mencii la verkon "Esperanto-Turka Granda Vortaro" de Hayrettin Dural, la prezidanto de la lasta Esperanto Asocio. Tamen Hayrettin Dural forpasis antaŭ ol li sukcesis kompletigi tiun verkon. La vortaro, li provis krei, estas tre ampleksa verko. Post lia forpaso, lia filino pibonigis ĝian aspekton kaj presigis malmultan nombron da kopioj omaĝe al sia patro sed la vortaro bezonas gravan redaktadon kaj ĝustigon, kiun oni povas realigi nur per longdaŭra laboro.

² <http://vortaro.net/>

The screenshot shows the website interface for the Esperanto-Turka Vortaro. At the top, there is a search bar with the word 'lerni' entered. Below the search bar, there is a sidebar on the left with navigation options: 'bazlernejo', 'eklerni', 'lernanto', 'lernejo', and 'lerni'. The main content area is divided into two columns. The left column is titled 'Legasistanto' and contains a search bar with 'lerni' and a button '+ Aldoni tekston'. Below this, there is a text snippet with a highlighted word 'laŭte' and a button 'yükses sesle'. The right column is titled 'İstatistikler' and contains a table with the following data:

İçerik			
Kök			
Madde	2739	21	2760
Tanım	5200	117	5317
	5311	163	5474

Anonco de ESF

Se vi instruas aŭ instruis en universitato kaj parolas Esperanton, bonvolu plulegi kaj reagi:

* sendu vian nomon, urbon, landon, ret-adreson, fakon pri kiu vi instruas aŭ instruis al la ret-adreso **<esperanto.en.universitatoj@gmail.com>**

* se vi, krome, instruas kurson pri Esperanto aŭ pri interlingvistiko en via universitato, informu ankaŭ pri tio.

* se vi deziras financon helpon de ESF por realigi scian esploron pri Esperanto aŭ interlingvistiko, bonvolu rigardu la kriteriojn: **https://**

www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/

* se vi deziras financon helpon de ESF por partopreni scian konferencon aŭ kongreson neesperantistan por prezenti tie referaĵon, bonvolu

rigardu la kriteriojn: **https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/**

* se vi ŝatus partopreni la laborojn de reto de universitatoj por internaciigi la universitatan medion per Esperanto, informu ankaŭ pri tio.

Temas pri klopodo intensigi la agadon por Esperanto en universitatoj kunlabore inter ILEI kaj ESF.

Dankon!

ILEI/ESF



Por lingva justeco en multkultura mondo
For linguistic justice in a multicultural world
ekde 1968 | since 1968

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

La bezono senti nin kune

Unu el miaj antaŭuloj kiel Prezidanto de UEA kutimis priskribi sin kiel “la prezidanto de ĉiuj esperantistoj.” La vortoj ŝajnas unuavide pretendemaj. Eĉ se oni enkalkulas ĉiujn aligitajn membrojn de UEA (la membrojn de la aliĝintaj landaj asocioj), sendube ili konsistigas nur iun onon de la monda esperantistaro: duonon, kvaronon, okonon, kiu scias? Preter difinaj defioj, pro la disvastiĝo de interreto la lingvo estas pli kaj pli facile lernebla kaj uzebla ekster ajna organiza kadro. Se multiĝas komencantoj kaj progresantoj, kiuj apenaŭ scias, kio estas UEA – en kiu senco mi estas ilia prezidanto?

Kaj tamen, tamen... mi komprenas mian antaŭulon.

En la regulaj retkunsidoj de la Estraro, ĉiun duan semajnon, ni traktas amason da temoj kiuj tuŝas la vivon de Esperantujo, ne nur en la riĉaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko, sed krome kaj eĉ precipe en la “plimulta mondo” – la landoj, kie loĝas la plej granda parto de la homaro. En tiuj kunsidoj, oni ekhavas pli ĝustan komprenon de la vasteco kaj diverseco de nia tutmonda komunumo. Kaj temas ne nur pri la nunaj esperantistoj. Nia Estraro devas krome pensi pri la potencialaj esperantistoj – pri tiuj milionoj da homoj, kiuj ankore estas niaj samideanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne trovis sian vojon al la lingvo. Ili ekzistas ĉie, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la mondo, kaj ne nur en

tiuj lokoj, kiujn ni mem persone konas aŭ konsideras gravaj.

Tiu malfermiteco, tiu zorgo pri ĉiuj homoj, kies korojn tuŝis aŭ povus tuŝi la revo kaj realo de Esperanto – tio estas kerna vivneceso por asocio, kiu aŭdacas nomi sin universala. Mi estas fiera, ke UEA ekde sia fondo ludas tiun vojmontran rolon. Tiuj samaj valoroj respeguliĝas ekzemple en niaj fondaĵoj, nemalhavebla rimedo por konkrete esprimi solidarecon inter homoj pagipovaj kaj nepagipovaj, inter Nordo kaj Sudo, inter Oriento kaj Okcidento. Miloj kaj miloj da tiaj agoj de reciproka, transkultura aprezo kaj subteno fluas tra niaj kontoj ĉiujare.

Ankaŭ la nova membrosistemo de UEA enkorpiĝas tiujn valorojn. Ĉiu membriĝo de homo el riĉa lando subvencias la malpli koston aliĝon de homo el malpli riĉa lando. Ĉiu membriĝo estas, do, solidara ago. Kiel ajn evoluos la organizaj kaj kulturaj formoj de la Esperanto-movado, mi estas certa, ke restos bezono de tia komuna universala asocio, en kiu ni povas senti nin kune – asocio kiu ebligas al ĉiuj homoj, per la simpla pago de kotizo, esprimi sian kredon je la nuno kaj estonteco de Esperanto.

Tial, sojle de nova jaro, mi invitas ĉiujn legantojn de ĉi tiu mesaĝo aliĝi al UEA, montrante tiel fidon al nia komuna forto. Kaj samtempe mi sendas bondezirojn ne nur al niaj aktualaj membroj, sed al ĉiuj homoj, kies vivon lumigas la lingvo de Zamenhof. Viaj zorgoj estas niaj zorgoj; viaj aspiroj estas niaj aspiroj. Kiel via

Prezidanto, mi laboras kun niaj estraranoj kaj komitatanoj, niaj ĉefdelegitoj kaj komisiitoj, niaj mecenatoj kaj honoraj membroj, por kunkonstrui tian mondan asocion, kiun ni ĉiuj meritas kaj bezonas.

Mi deziras entuziasman, amikecan, kaj solidarecan jaron 2019 al ĉiuj esperantistoj!

Mark Fettes

Nova n-ro de Israela E-isto donace por la novjaro

de Amri Wandel

Karaj geamikoj,

Por la nova jaro 2019 ELI donacas du surprizojn. Unu mi jam anoncis pasintsemajne, malaltiĝis la loĝkosto por la 20-a Israela Kongreso kaj MONA-kunveno en aprilo. Bv. aliĝi ĉe <http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>

La dua - nova numero de Israela E-isto, kiun vi povos senpage elŝuti ĉe

<http://esperanto.org.il/dosieroj/IE166.pdf>

Abonantoj ricevos la paperan version de ĝi. En ĝi vi trovos i.a. raportojn pri diversaj kongresoj - la 19-a Israela Kongreso en Akko, la UK en Lisbono, kaj la Itala Kongreso. Tiu ĉi estas la unua n-ro de la nova redaktoro, Mikaelo Lineckij, ni deziru al li sukceson kaj kunlaboron viaflanke (sendu artikolojn:). Mi redaktis la bultenon dum 11 jaroj kaj produktis 18 numerojn, kiuj estas videblaj ĉe <http://esperanto.org.il/ie.html>

Feliĉan novjaron de la Novjara Renkontiĝo en Germanio,

Amri Wandel

Prezidanto de ELI

N-ro 166 vintro 2018

ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN-1565 3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האגודות הישראליות - ביטאון האגודה לאסטרטור

KONGRESOJ, KONGRESOJ...

La 19-a Kongreso de israelaj esperantistoj, 3-5.05.2018 en Akko

En la 103-a Universala Kongreso de UEA 28.07-4.08.2018 en Lisbono (Portugaliao)

Kongreso de italaj esperantistoj en San Marino

Senpage abonu kaj ankaŭ kontribuu al la revuo Turka Stelo

Nova ankaŭ en ePub formato!

Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Januaro 2019 n-ro: 37

Merhaba, Sahuton,

Ĉiok 2019 sayımız ile üç yıl devirip yeni bir yıla başlıyoruz. Kuzey yarım kürede kaç artık iyice yerleşti, evinizde sıcak bir kışta okumanız için size gene birbirinden güzel yazılar hazırladık. Mesela:

- * Arkadaşımız Konuralp Sunal kuvvetli kalemli ile yepyeni bir sinema serüveni başlatı: "Mühürlemiş zaman".
- * Arnavutluk'tan iki güzel hikaye.
- * Romanya ve İtalya'dan iki mizah yazısı
- * Litvanya'dan başka bir hikaye
- * Yunanistan'dan bir mizah hikayesi
- * Ukrayna'dan, Fransa'dan, Avustralya'dan hikayeler ve romanlar
- * Dili öğrenmekte olan arkadaşlarımız için de yeni bir köşeye daha başlıyoruz: "Esperanto Öğrenelim". Bu sayıda Vietnam'dan bir hikaye ile kosa süzülüyor.
- * ve daha başka bir çok şey...

Hepinize iyi okunmalar!

Kun nia januara 2019 numero ni finas tri jarojn kaj eniras en novan jaron. En la norda hemisfero vintro enadikiĝas. Ni preparis por vi belajn legaĵojn por ke vi legu ilin en la varma angulo en via domo.

Ekzemploj:

- * Nia amiko Konuralp Sunal kun sia forta kuzojno komencas novan rubrikon pri kino: "Tempo Sigelita"
- * El Albanio du belaj rakontoj
- * El Rumanio kaj Italio du humuraĵoj
- * El Litvio alia rakonto
- * El Ĉeĥio rakonto el miltologio
- * El Ukrainio, Francio kaj Aŭstralio rakontetoj kaj noveloj
- * Nova rubriko por niaj ĝemikoj kiuj lernas la lingvon "Ni lernu Esperanton". En tiu numero estas rakonteto el Vjetnamio kun mallonga vortaro.
- * kaj multaj aliaj...

Bonvan legadon al ĉiuj!

WWW.CDELI.ORG

TURKA STELO
Elbasanto: Turka esperantistaro
Redaktoro: Vasil Kadifeli - vaskad501 (cc) gmail (gruĝto) com

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esperanto pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Uĉo La Chaix-de-Font

Turka Stelo • Januaro 2019

Karaj geamikoj,

Turka Stelo estas senpaga, monata, 32 paĝlonga revuo, kiu enhavas novaĵojn, literaturaĵojn, ŝercojn, krucvortenigmojn, sciencajn, kulturajn kaj multajn aliajn diverstemajn artikolojn. Eblas aboni al ĝi nur per via retpoŝtadreso. Sendu ĝin al vasilkadifeli@gmail.com

Turka Stelo estas liverata en pdf, ePub kaj .mobi formatitaj dosieroj. Ĝi estas ankaŭ senpage kaj senabone elŝutebla el la retpaĝo <https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revueto/>

En februaro 2019 ĝi atingos la 38-an numeron.

Vi ankaŭ povas kontribui per viaj verkaĵoj kaj tradukaĵoj. Konatigu vian kulturon al preskaŭ 350 abonantojn tra la mondo.

Feliĉan novan jaron al ĉiuj,

Vasil Kadifeli

La 11-a regulo de la Unua Libro estas la jena:

11. La kunmetitaj vortoj rezultas de simpla kunigo de la elementoj, kiuj formas ilin, skribitaj kune sed disigitaj per streketoj[*]. La fundamenta vorto devige sidas fine. La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj. Ekzemple : vapor'ŝip'o (bateau a vapeur) konsistas el vortoj: vapor – vapeur, ŝip – bateau, o – karakteriza finaĵo por substantivo.


[*] *En leteroj aŭ verkoj por personoj, kiuj jam konas la lingvon, oni povas malmeti tiujn streketojn. Ili celas ebligi al ĉiuj facile trovi en la vortaro la precizan sencon de ĉiu el la elementoj de la vorto, kaj sekve ricevi la kompletan signifon sen ia ajn antaŭa studo pri gramatiko.*

La substrekita frazo de la regulo supren estas kutime neglektata, sed tamen ĝi estas unu el la plej gravaj reguloj por kompreni la veran strukturon de nia lingvo. Bonvolu por kompreni nian lingvon pli bone, elŝuti la du dosierojn

1) “**Ĉu Esperanto fundamente estas facila?**”

2) “**La perdita ŝlosilo**”

el la jena ligilo:



http://bonalingvo.net/index.php/%C4%88u_Esperanto_estas_fundamente_facila

Ilin verkis Pierre Telle Bouvier el Francio kaj suben estas la fina kaj amuza parto de la unua dosiero:

La legenda kreo de la lingvo Esperanto El la Genezo, la unua libro ... de la Torao.

Por ilustru la malatentitan frazon : la finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj , lasu min rakonti, tute ŝerce , kiel kreiĝis Esperanto. Fakte ne Zamenhof sed ja Adamo kreis ĝin. Jen kiumaniere :

Dio montris al Adamo vicalvice ĉiujn siajn kreaĵojn por ke tiu nomu ilin. Sed Adamo diris ĉiufoje nur ho ! o ! o ! Do Dio klarigis: jes ja: o signifas tio, kio estas, sed precizigu ĉiun malsimile. Antaŭmetu aliajn sonojn por distingi la vortojn, ekzemple: ter'o, mar'o...

Adamo provis: o o ... or'o , li diris por la flava metalo. Poste : F..flo...flor'o . Bone diris Dio por lin kuraĝigi. Venis papilio sur la fingron de Adamo, kiu montris ĝin fiere kaj rediris “flor'o”, same kiel Bambi kelkajn jarmilojn poste. Ridante kaj babilante Dio korektas al papilio kaj indikas novan sonon bo kaj prezentas kreskaĵojn kaj helpas dirante: “her..”. “herb 'o” krias Adamo. Bone , diras Dio, kaj li montras arbon :“a.. arb'o!”diras Adamo. Brave!

Kaj se paroli pri tio, ĉu vi scias kial la vorto arbo

similas al barbo? Jen la klarigo : en tiu momento, Adamo sin turnante al Dio sur lia nubo, kaj vidante, sed kapalpiede sur la vizaĝo de Dio, ion kiu similas al arbo, li montras tion kaj diras: Bo, Ba, Barbo! Tial similas la du vortoj.

Adamo nomas tiele ĉiujn objektojn, plantojn kaj bestojn, kiujn Dio prezentas duope, ĝis la fino. “fino ... ino”, tio donas al Dio ideon. Li endormigas Adamon kaj kreas inon. Li ŝin prezentas al Adamo, kiu nur sukcesas diri pro miro:”ha! a! a!” Denove Dio klarigas, ke li devas precizigi: a signifas kiu havas kvaliton aŭ rilata al, ekzemple: kia, bel'a, ina Adamo kreis: mi 'a, bon'a, et'a, afabl'a, eĉ dezir'ind'a, li eĉ iom konfuzis la kategoriojn nomante ŝin Eva...

Sed en la Edenĝardeno, Dio malpermesis al Adamo kaj Eva manĝi la frukton de la arbo pri kono de la bono kaj la malbono. Certe vi scias, ke temas pri malarbo (malus en la latina) sed Adamo jam nomis ĝin pomarbo, do Dio, kiu ne volis perdi sian latinon, proponis tamen mal al Adamo por formi la malajn vortojn: mal'bon'a, mal'bel'a, mal'permesit'a...

Prove, post manĝo de la pomo ili eksciis, ke ili estas malvestitaj, nudaj, ĉar ili konsciis pri siaj seksoj, do Adamo proksimiĝis de Eva kiu kriis: hi, i, i... Tiufoje, anstataŭ Dio, estas Adamo kiu klarigas: “ ne diru nur: i = manifestiĝi, sed kompletigu, ekzemple : mi, tim'i, aŭ pli bone: mi tim'as, sed mi volas bonon por vi, ne tim'u! Mi dezir'as nur am'i vi'n!”

Do la kunulino ebligis al Adamo krei la ivortojn: am 'i, dezir'i, kis'i, manĝ'i kaj poste la variaĵojn as, u, is... kaj fine la tre gravan n por povi distingi : mi am'as vi'n, ĉu vi mi'n am'as? *, am'u mi'n!

Sed kiam Adamo volis seksumi kun ŝi, sekve Eva kontribuis tiam al la kreado de vorto dirante: he! e! e = rilate al la tro rapida ago de Adamo, precizigante :“mal 'rapid'e, pli mal'rapid'e far'u!” ...

Tiele ili do kreis la adverbojn por nuancigi la diraĵojn, kaj finfine estis kreitaj ĉiujn plej fundamentaj vortoj: o, a, e, i, u, as, is, os, us, j kaj n.

Tiu nepre vera rakonto montras tre bone ke, se la radikoj estas gravaj por distingi la vortojn, la finaĵoj estas la plej gravaj kaj fundamentaj en la vortkonstruo de nia lingvo.

* Sed kiam Eva metis tiun demandon al Adamo, tiu respondis: Ĉu mi havas elekteleblon?



اللغة الدولية: الإيسرانتو

إن الإيسرانتو أساس لجبل أكثر عدلاً ومساواةً من اتواصل العالمي بين مختلف لغات العالم
[تعلم المزيد](#)



من نحن



تفاعل



تعلم الإيسرانتو

تعلم الإيسرانتو

أسهل لغة في العالم؟

إن الإيسرانتو سهلة وسريعة التعلم والتأقلم مع الأفكار والثقافات المختلفة
 إن الغالبية الساحقة من متعلمي اللغات وجدوا الإيسرانتو كأسهل لغة إتقاناً
[اقرأ المزيد](#)

<http://esperanto.net>
 estis tradukita al la
 turka, araba kaj persa.
 Kiam ni havos ĝin en la
 kartvela, armena, azera
 kaj hebrea?
 Kontaktu Emilio Cid,
 cid.emilio@gmail.com,
 se vi pretas traduki.

UZU ESPERANTON

"أصدقاء الإيسرانتو"

عبر "أصدقاء الإيسرانتو" بإمكانك إظهار
 دعمك للإيسرانتو وتلقي نشرات القصيرة عن
 الإيسرانتو بلفتك الأصلية

[اقرأ المزيد](#)



تعلم الإيسرانتو



كتب بالإيسرانتو



أفلام بالإيسرانتو



أخبار بالإيسرانتو



نشرات إذاعية بالإيسرانتو



"أصدقاء الإيسرانتو"

